






Bruna Kivio, unika nov-zelanda birdo



Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Fenruaro 2003
Numero 61 (vol. 11, no. 1)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 61 (volumo 11, numero 1), Januaro-Februaro 2003

Redaktoro: Donald Broadribb
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143
Lawson St, Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:
libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towomba Road, Oakey
Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:
hazgreen@twmba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

La kovrilbildo:

La kivio (*Apterix australis mantelli*) estas unika noktema neflugipova birdo, tre rapidkura kaj piedbatkapabla.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Nekrologo: Brian Curry (Terry Manley)..9	
Nekrologo: Ralph Harry (Marj Ellyard)	10
Vintraj eventoj (Franciska Toubale)	13
La somerlernejo: niaj instruistoj (Terry Manley)	16
Kun Esperanto vi estas amiko (Horvath Sandor)	19
La ses diversnivelaj ekzamenoj en Aŭstralio; Ekzamenrezultoj (Marcel Leereveld)	25
Skribas la legantoj	27
(Brendan Linnane	27)
(Franciska Toubale	27)
(Leila Lucas	28)
Indekso 2002	29

Recenzoj:

<i>La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto</i> (rec. Marcel Leereveld)	3
<i>La bahaa kredo kaj Esperanto realigas la mondan pacon</i> (rec. Marcel Leereveld)	8

For the Beginner:

Is *Varma* “Warm” or “Hot” in English?
p. 22

ESK estas legebla per Interreto:
<http://www.esperanto.org.au/esk>

Limdato por artikoloj por la marta numero: 15 februaro.

Recenzas Marcel Leereveld

La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto. Ĉefredaktoro: Michel Duc Goninaz. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 2002. 1265 paĝoj, bindita.


Por verki ĉi tiun recenzon mi studis la enhavon de la mezalfabetaj literoj *l* kaj *m*, por havi mezan juĝon. Mi krome, kompreneble, legis la enkondukojn, kaj inkluzivigis kelkajn iliajn partojn en mia juĝo. Mi precipe komparis la *Novan* kun la antaŭa eldono, sed jen kaj jen juĝis ambaŭ. Menciante la antaŭan *PIV*, mi inkluzivigis la 1987-an Suplementon. Kie ambaŭ eldonoj samas, kio estas plejgrandparte la kazo, mi tre malofte konsideris (kvankam legis) la tekston kritike; por samtempe recenzi la malnovan *PIV* mi bezonus multe pli da tempo kaj da papero, kaj ankaŭ da kritikado. Sendube la 1970-a *PIV* jam sufiĉe vaste laŭdatis kaj kritikatis, de aliaj.

La teĥnika parto

Ĉar la tuta libro enhavas \pm 1250 paĝojn (antaŭe 1290), miaj \pm 125 paĝoj recenzitaj formas la dekonon. Por havi recenzon pri la tuta libro, oni do deobligu miajn laŭdojn, laŭdetojn, kritiketojn, kaj kritikojn. Cetere la pezo de la malnova estis 1,3 kg, de la Nova 1,6 kg. La litertipoj estas preskaŭ samgrandaj, sed la paĝoj de la nova estas iom pli grandaj kaj ilia presita surfaco estas konsiderinde pli granda, pro tio la plia enhavo. Malagrabla kaj kelkfoje konfuze la litero *i* malfacile distingeblas for de la litero *l*.

En naciaj lingvoj, ŝanĝiĝemaj ja, la celo de la vortaro estas simple registri la lingvon uzatan kaj registri ĝian

ŝanĝiĝadon laŭ signifoj, laŭ neologismoj, kaj, malpli, laŭ ortografio kaj laŭ prononcado. Ĉar la ekzistarojto kaj celo de Esperanto estas malsamaj, kvankam ne malpli vastaj, ĝi klare devas montri la neŝanĝeblan Fundamenton (inkl. la oficialigitajn vortojn) for de la neologismoj, por ke konscienca esperantisto povu kiomeble uzi la oficialajn vortojn, kaj por ke ĉiu uzanto de la vortaro klare konsciu, ke neoficialaj vortoj, t.n. neologismoj, estas nur proponoj, ne de la Vortaro, sed de iu ajn persono, kaj ofte du aŭ tri malsamaj por la sama signifo. Ĉiu esperantisto rajtas proponi, do uzi, malsamajn aŭ pliajn neologismojn. La tasko de bona Esperanto-vortaro estas klare diferencigi la du grupojn kaj krome doni oficialajn alternativojn kunmetitajn (kie tio eblas) por la neologismoj. La *Nova PIV* (same kiel la antaŭa) ne faras tion:¹ por diferencigi utilas nur uzi malpli grandan litertipon por la neologismoj ol por la oficialaj; krome Fundament'ecajn alternativojn ĝi malofte donas. En ĉi tiu senco la libro estas danĝera, ĉar la karaj sed sklavemaj Samideanoj simple, senkritike, prenas iun ajn vorton el *NPIV* por uzi

1. Mi plurloke legis similan kritikon, sed mi ne komprenas ĝin. La *NPIV*, same kiel la antaŭa, tre zorge kaj klare indikas la fundamentecon de vortoj el la Fundamento, per elstara asterisko * ĉe la komenco de la vorto, kaj indikas la karakteron de oficialeco ĉe ĉiu oficiala vorto. Manko de tia indiko indikas ke temas pri t.n. "neologismo". Ni trovas, ekz. **ir/i*, *Irak*^{8o}, *Iren/o*, kiuj estas fundamenta (indikita per *), en la 8a Oficiala aldono (indikita per ⁸, kaj "neologismo" (manko de signo de oficialeco), respektive. — 

ĝin (“Oh, ĝi estas en *PIV*, do ĝi estas uzebla”).

Alia, kvankam multe malpli grava, kritiko mia estas ĝia malamo ante¹ la belan kaj utilan literon *ĥ*, ŝanĝanta ĝin al *k*, kiel meĥaniko kaj meĥanismo,² kaj Melkioro por Melĥioro. Sendube tiu tendenco estas precipe franca, kaj nekonscie kontraŭaraba, sed ĝi ĉagrenigas min kaj verŝajne ankaŭ nian amikon Josef Kavka. Same tendenca estas la ne malofta uzo de *c* (anstataŭ *k*) por la latina *c* (Licio, ktp.).³

Kompreneble en ĉiu tiom granda kaj detalema verko enŝoviĝas kelkaj preseraroj. Sed estas tre malmultaj preseraroj en ± 125 paĝoj, sendube pro la granda nombro da kontrolantaj kunlaborantoj.

La enhavo

La enciklopedia parto, tre grava kaj detalema, estas preskaŭ perfekta, verŝajne ĉar la verkistoj povis uzi la naciajn enciklopediojn (ili ofte Larus⁴-aspektas france). Mi povis trovi nur unu eraron, pri mia lando: “aŭstrala” devas esti “sudhemisfera” kaj “aŭstralo” (ne la stulta “aborigeno”) = indigeno de Aŭstralio (kun la deriva “Aŭstralujo” = lando de la aŭstraloj)

Kelkaj (malmultaj) klarigoj estas neklaraj. Estas danĝera novaĵo, trakti plurajn ĉefelementojn de kunmetaĵoj kiel sufiksojn. La aŭtoroj praktike alikategoriigis plurajn vortojn, ekz. *lumi* al *lumo*.

La klarigoj kaj 1a ekzemploj en la nescienca parto estas ĝenerale samaj al tiuj en la malnova *PIV* (tio ŝparis serĉi milojn da ekzemploj), kun jen kaj jen mallonga aldono aŭ korekto. Sed pluraj, kvankam precipe sciencaj, kapvortoj ricevis gravan ŝanĝon aŭ aldonon.

Ĝenerale la verkistoj uzas, krom bonegan Esperanton, la plurajn ne-logikaĵojn kaj lingvisme malĝustajn esprimojn svarmantajn en la literaturo (kiaj estas: vortoj kun infikso [*sinmortigo* anstataŭ *simortigo*]; “sub kontrolo de” anstataŭ “sub regado de”; “ne ankoraŭ” [francismo sur paĝo 1265] anstataŭ “ankoraŭ ne”; “fare de” anstataŭ “ate de”; “denove” anstataŭ “ree”; “krom” kie klaras nur “escepte de”; tendenco al la -atismo; “disde” anstataŭ “for(el) de”; ktp.)

La “Ĝenerala Gvidanto” de la nova eldono enpraktikigis kelkajn siajn fortajn principojn pri la gramatiko, vortkunmetado, kaj vortaraspekto. Unu el tiaj estas, klasigi plurajn vortojn laŭ alia kategorio ol oficiala, antaŭ ol la Akademio decidis pri tiuj eventualaj ŝanĝoj. Laŭ mi tia agado estas nepardonebla. Unu el la rezultoj estos, ke ni ne plu scias, ĉu ekz. urino estas la radiko au mallongigo de urinaĵo el urini (ĉar la ago urinado/urino malofte uzatas). Ankaŭ lian liberecon pri transitiveco mi trovas malforta: tio estas la komenco de la disfalo de la verba sistemo en Esperanto, iomete same kiel okazas en la angla lingvo. La tialoj donitaj estas la kutimaj, ĉar oni ne komprenas, ke ekzistas du akuzativoj: unu por la objekto kaj unu kiel anstataŭanto de prepozicio. Pro tiu nekompreneco estus pli bone, se Zamenhof estus malpermesinta iun ajn elprepozician akuzativon (kun specia-

1. = rilate — [d]

2. Sed tion ne faris la *NPIV*, ĝin faris la *Oka Oficiala Aldono*; *NPIV* nur registris tiun fakton. — [d]

3. Laŭ permeso donita de Marcel Leereveld, mi enlasis nur kelkajn ekzemplojn el longaj listoj provizitaj de li por ĉi tiu kaj aliaj vortotemoj. — [d]

4. *Larousse* estas franca landa vortareldonejo tre granda. — [d]

la indiko por movo al loko), kaj ke Pasivoj de ŝajne netransitivaj verboj eblas nur se ĉeestas la prepozicia prefikso, ne se ĉi lasta subkomprenatas. Ne helpas la komprenon la neutila ideo pri valento, parte kreita de la german-latin-greka gramatika principo, ke la centro de la frazo estas la verbo, ne la subjekto (kiu en Esperanto kaj eŭropaj lingvoj vere estas la centro). En Esperanto eĉ pli gravas ĉi lasta valorigo de la determinadaj reguloj reprezentantaj la veran komunikadirekton de la bildo. Pri infiksoj: la aŭtoro diras ke li ne akceptas sensignifan infikson en kunmetaĵoj, sed favoras “finaĵojn interne”. Stranga principo! Mi plue ne samopinias pri lia kreo de multaj homonimoj.

Sed mi ankaŭ rimarkis multajn gravetajn kaj gravajn pliboniĝojn:

(1) Preskaŭ ĉiuj (sed ne ĉiuj) inaj nomoj (precipe antikvaj) ricevis la ofinaĵon anstataŭ la PIV-a -a (*Melizino*, ktp.); Zamenhof uzis -a nur por nomoj en -a, ne por ekz. *Elizabeto*.

(2) Ĉie uzatis “danke al” anstataŭ la malĝusta “dank'al”.

(3) Ŝanĝoj kiaj *monometalismo* al *unumetalismo*.

(4) Popolanoj nun skribiĝas per minusklo, kiel faris Zamenhof.

(5) La rezisto al la radikigo de kunmetaĵoj (*dependi*, ktp.).

(6) La menciita intenco (“ke mi ege ŝpareme registris novajn vortojn”) malmulte enkonduki neologismojn, tamen laŭ mi nur duone plenumita.

(7) Proponoj kiaj estas uzi ekz. nur la radikon “redakt” por ĉiuj samsignifaj derivaĵoj (redakcio, redaktoro, ktp.), konforme al la dua parto de la 15-a paragrafo¹.

(8) La reteno de la indikoj *tr.* kaj *ne-tr.*, tiel ke ni povu scii, ĉu uzi aŭ ne la

rilatan Pasivon.

(9) La scienca parto ŝanĝatis kaj plivastigatis konsiderinde, dum pluraj neutilaj vortoj sciencaj forigatis.

(10). La utilaj ŝanĝoj en la transkribado de latin- kaj grekdevenaj vortoj.

(11) La jenkajjena aldono de neneologisma sinonimo, ekz. *labialo* = *lipsono*.

(12) Ke nenie uzatis la monstra “far”.

(13) La forigo de pluraj arĥaikaj vortoj.²

(14) Ŝanĝo de vortoj kiaj: *lupino* al *lupeno*, *magnetofono* al *sonbendregistriilo*, *marabuto* al *marabutejo*, *deŝovo* al *krommarĝeno*, *Meksikio* al *Meksiko*, *metapsikio* al *parapsikologio*, kc.

(15) La ŝanĝo ante neesperantajn PIV-vortojn al esperantaj (*Metuŝelaĥ* al *Metuŝelaĥo*, ktp.)

(16) La aldono de tabeloj pri Matematikaj Operacioj kaj pri Matematikaj Simboloj.

(17) La gravaj aldonoj al multaj eroj, ekz. tri al “masko”.

(18) La bildoj multe pliboniĝis, speciale tiuj pri botaniko kaj aliaj sciencoj; tuŝas nin la kapo de Zamenhof por indiki la kapajn partojn.

(19) Mi laŭdas la multajn utilajn kaj ĝustajn ŝanĝojn en la nomoj biologiaj (tiun parton mi trovas la plej bona), sed tre strangas la uzo de speciala (necesita) vorto “specio”, dum oni ne uzis tiajn por aliaj dividiĝoj (“familiio”, “genrio”, “ordio”); ankaŭ ĉi lastaj havas ĝeneralan uzon.

Evidente la botanikistoj estis eŭropaj: la malsaĝa vorto “falfolia”,

1. T.e., de la 15a paragrafo de la sekcio “Gramatikio” en *La Fundamento de Esperanto* de Zamenhof. — [db]

2. Vidu listeton de kelkaj sur la sekva paĝo.

ĉar krom malmultaj arboj kies folioj neniam forfalas de la arboj, ekzistas du specoj da “falfoliaj”, (1) tiuj kies folioj forfalas en la aŭtuno (ili nomiĝas sezonfoliaj arboj), kaj (2) tiuj kies folioj forfalas dum la tuta jaro (ekz. multaj specoj de aŭstraliaj eŭkaliptoj).

Aperis sufiĉe multaj novaj vortkunmetaĵoj, inter kiuj la jenaj: *lokumi*, *genloko*, *lokaro*, *translokiĝo*, *sunmaku-lo*, *kvitanmarko*, *krudmaterialo* kc.

En la literoj *l* kaj *m* aperis ± 200 novaj (= ne en la antaŭa PIV) neologismoj (por la tuta libro tio do estos ± 2000!): *Laŭrazio*, *leandro*, *leceburga*, *lecideo*, *legionelo*, kc.kc.

Se oni konsideras la liston, oni verŝajne ne rekonas naŭ dekonon de la vortoj, kaj verŝajne neniam bezonos scii pli ol kvinonon da ili. Sed vortaro volas, kaj devas, esti kompleta, por esti utila kaj fidinda. La plejmulto el la novaj vortoj estas biologiaj, speciale botanikaj, kaj la resto alisciencaj kaj ordinaraj vortoj. El la nesciencaj vortoj preskau ĉiuj estas necesaj (*frandzi*, *midzi*, *miksta*, ktp.), kiel cetero la granda plejmulto el la el la malnova PIV transprenitaj nesciencaj vortoj. Ĉi tiuj meritas esti presitaj ege malgrandlitere, kun klara normala alternativo oficialvorta. Sed NPIV ne faris tion, kaj tiel helpas polucii nian lingvon. La pli inteligenta angla lingvo montras, ke por eĉ teĥnikaj novaj nocioj la lingvo povas krei novajn vortojn el sia propra vortstoko.

Tamen NPIV ankaŭ malaperigis kelkajn vortojn (± 400 en la tuta libro, multaj el ili sciencaj. Jen kelkaj el ili: *laktazo*, *laktoflavino*, *logistiko*, *Lotofago*, *magnetostriĝo*, *maĥo*, kc.

La geografia mikspoto

La plej malbona, malbonega, parto de

la *Nova PIV* estas la geografia. Pleje kulpas pri tio la mallerta kaj ĥaosa trakto ate de¹ la Akademio, sed la verkintoj estus povintaj uzi kaj krei Esperantecajn formojn almenaŭ tie, kie la Akademio ankoraŭ ne diktegis ilin, se ili ne dezirus ripari la Akademian fuŝaĵojn. Ili enkondukis nur unu, tre gravan, plibonigon, nome ke nomoj de landanoj komenciĝu per minusklo. Sed ili ne kuraĝis fari tion ĉie, do 2/3 havas minusklon, kaj 1/3 havas majusklon (sed ofte ĉi lastaj nomoj estas forlasitaj, ĉu por skrupulo?).

La plej malsaĝa decide estis, ŝanĝi en la teksto ĉiujn landnomojn for de -ujo al -io (kvankam -ujo estas preskau ĉie duarange menciita ĉe kapvortoj). Fari tion ili ne devis, kaj la decido montras gravan mankon de esperantologia klero: la neologisma sufikso -i inkluzivus 3 lingvismajn esceptojn en la esperanta vortfarado, kaj krome plimalfaciligus la rekonon de nomoj por landanoj (se *Ĉilio*, ĉu *ĉilo* aŭ *ĉiliano*? se *Moravio*, ĉu *moravo* aŭ *moraviano*? se *Etiopio*, ĉu *etiopo* aŭ *etiopiano*?)

Geografiaj nomoj estas preskau ĉiuj (escepte de la oficialaj) neologismoj, kaj kiel tiaj estas radikoj. La signifoj de la vortoj kiuj formas la geografiajn proprajn nomojn ne troviĝas en la novaj esperantaj vortoj. Kvankam *Rio* signifas *rivero*, *de* signifas *de*, kaj *Janairo* signifas *Januaro* en la portugala lingvo, la nomo *Rio de Janeiro* ne reprezentas januaran riveron, ĝi reprezentas la urbon en Brazilo, kiu konsistas el nur unu nocio, kaj tial bezonas en Esperanto nur unu vorton de unu radiko, nedividebla. Se la esperantistoj volas nomi tiun urban *Januarrivero*, ĉi tiu vorto, propra no-

1. “Ate de” = farita de. — [B]

mo, estas unuradika neologismo. Same *Riodejanejro* au *Riverodejanuaro* aŭ *Blubabiĉo*, se oni volas. Estas do nebla, havi interne de tia neologismo streketon au apostrofon au majusklon (streketo nur je linifino). La unua nomo, *Januarrivero*, nur instruas al la esperantistoj la signifon de tri portugalaĵoj. La dua similas al la origina nomo. La tria ne. Kvara povus esti *Riodejaneiro*, por plisimiligi ĝin al la origina. Cetere tute ne gravas, kiun novan vorton oni kreas por uzo en Esperanto. Krome la vorto reprezentas nur unu nocion, do ne povas esti plurala. Ĉiuj tiuj postuloj estas obeitaj en la vortaro jen kaj jen, kun tre multaj mikspotaj esceptoj. Konsideru la neesperantaĵojn: *Liparoj* (= *Lipararo* aŭ *Liparojo*, aŭ *Liparjo*, laŭdezure), *Los-Anĝeleso* (= *Losanĝleso*, aŭ *Anĝelurbo*, au *Laanĝelaro*, ktp.); *Filipinoj* (= *Pilipinio* au *Filipinio*). Alia tia neesperanteca polucio estas la uzo ante duoblan saman konsonanton aŭ ante vorton jam por alia nocio ekzistantan, pro manko de kuraĝo uzi ne tute similan nomon. La enloĝantoj de tiaj lokoj ne rajtas mastri nin al sia naciismo. Neniel malĝustas anstataŭ *Finnlando* la nomo *Suomio*, au *Finlando* kiel unu radiko nedividebla. Baldaŭ oni kutimiĝos al *Bonono* por *Bonno*. Kaj *Kubao* por *Kubo*, *Maltao* por *Malto*, *kc*.

Krom la ĉi supraj mallogikaĵoj jen kelkaj pliaj strangaĵoj prigeografiaj:

(1) Kial ne *macedono/-ujo* por la dua signifo de *makedono/-ujo* por diferencigi kaj por internaciigi la nuntempan regnon? (laŭleĝe en Aŭstralio oni ne rajtas uzi "Macedonujo" ĉar ĝi inkluzivas la grekan parton).

(2) Pli facile rekoneblus *Loiro* (anst. *Loaro*) por *Loir*, kaj *Loireo* (anst. *Luaro*) por *Loire*.

(3) Kial *Majenco* anstataŭ la pli simila *Majnco*?

(4) Kial *Hago* sen la artikolo, sed *La-Pazo* kaj *La-Plato*?

La libro estas utila, tre utila, por kritikemaj specialistoj (ekz. tiuj kiuj specialiĝas pri teknikaj kaj alisciencaĵoj aferoj, speciale botaniko), kaj por lingvistoj kiuj deziras trovi Fundament'ecajn tradukojn por la centoj da nenecesaj neologismaj troveblaj en la Idoismema¹ literaturo. Por ordinaraĵoj esperantistoj sufiĉas bona nacilingva vortaro kaj *Plena vortaro*. Tio ne signifas, ke la *Nova PIV* ne estus bonega fonto por enciklopediaj informoj, kaj por la multaj ekzemploj de konataj verkistoj, precipe Zamenhof, kaj ofte por fidebla klarigo kaj vortplufado. Ĝi estas giganta verko montranta al la neesperantistoj kiom vasta Esperanto estas (kaj kiom multe pli oni devas lerni ol la vortkolekton en la lernolibroj).

Mi persone aĉetus ĝin: (1) se mi ne havus la malnovan *PIV*-on; (2) se mi bezonus la novajn sciencajn nomojn, botanikajn, zoologiajn, fizikajn, ĥemiajn, teknikajn, kiuj ne troviĝas en mia malnova *PIV* kaj se mi ne havus fakajn vortaretojn; (3) se mi ne kuraĝus (kvankam rajtus) elekti aŭ krei, laŭ mia propra gusto, la novajn kaj la ankoraŭ ne en Esperanton "tradukitajn" vortojn geografiajn (ekz. mi devis mem fari por Aŭstralio, de kiu troviĝas en *NPIV* nur ege malmultaj esperantaĵoj, multajn esperantigojn [kiaj *Darvino*, *Alburio*, *Pertho*, *Laŭncestono*, *Njukastlo*, *Murajrivero*, *Kanguaruinsulo*, *Botanibajo*, *Gundagajo*). □

1. = ema transpreni lingvaĵojn el la iama planlingvo nomita Ido. — [B]

Paul Desailly: *La bahaa kredo kaj Esperanto realigas la mondan pacon.* 146 A-4 paĝoj. Privata eldono, 2002. \$20.00. Aĉetebla ĉe UEA.

Valora libro por tiuj, kiuj serĉas ŝanĝon de religio aŭ eklezio, por tiuj kiuj deziras kompari religiojn kaj ekleziojn, por tiuj kiuj jam estas bahaanoj esperantistaj, por tiuj esperantistoj kiuj deziras legi lingve bonan Esperanton kaj kiujn ne ĝenas la blinda kaj teda akcepto ante¹ la diajn “manifestiĝojn” en la profetoj kaj sanktaj libroj, por tiuj kiuj konas la por Esperanto multe laborantan aŭtoron kaj volas helpi lin kaj simpatii kun li, kaj fine por tiuj kiuj deziras montri ĝin al bahaanoj ne esperantistaj por konverti tiujn al Esperanto.

Ĝi ne estas valora, eĉ ne interesa, por tiuj esperantistoj kiuj ne emas ŝanĝi sian religion aŭ eklezion aŭ kiuj estas ateistoj, kredantoj ne je dio aŭ dioj aŭ profetoj aŭ sanktaj libroj. Ili trovos principe malmultan diferencon inter bahaismo kaj la aliaj religioj. Fakte la bahaanoj ne deziras esti aparta eklezio: ili deziras reprezenti kaj enhavi ĉiujn religiojn, kaj montri kaj praktiki speciale la “bonajn” flankojn de la aliaj religioj. En tiu senco ili bone sukcesas, sed tamen ne sufiĉe revolucie por interesi la amasojn de jamaj dikredantoj kiuj kontentas pri siaj religioj. Ĝi krome ne altiros homojn kiuj malŝatas la bahaanan hierarkieman vidon ante la mondon: ĉiu persono estas pli grava ol iu alia. Mi kredas, ke oni ne povas konsideri la bahaismon filozofio, kiel oni povas la budhismon, kaj ĝi sekve ne respondas al religiuloj, kiuj serĉas pli “altan” ŝtupon de kredo.

Dirinte ĉisupron, mi devas substreki, ke kiel homoj kaj kiel kredantoj la bahaanaro estas ofte pli simpatia, pli helpema, malpli fanatika kaj sektema, pli honesta, kaj pli afabla ol la aliaj eklezianaroj. Do se mi dezirus filozofie diskuti religion, mi preferus kun ili, kaj se mi sentus la bezonon kredi je dio, mi elektus Dion ilian, kun la “manifestiĝ-oj”. Cetere, kaj simile al la kvakeroj, la bahaanoj substrekadas la neceson ĉiam interkonsiliĝi antaŭ ol fari decidon. Kaj konsekvence ilia daŭra batalado, kvankam nature ne tre sukcesa, por paco en la mondo. Malgraŭ ĉi ĉio, la bahaanoj kaj Paul Desailly estas tre optimismaj. Unuavide oni pensas, ke la propagando por la bahaismo inter esperantistoj estus samrezulta kiel la propagando por Esperanto inter bahaanoj. Sed oni forgesas, ke estas facila trovi adeptojn por Esperanto, kiuj ja ne bezonas forlasi por tio alian idealon, dum estas tre malfacila trovi adeptojn por la bahaismo, kiuj ja devus forlasi alian eklezion aŭ alian kredon ofte adoratan.

Kiel parteto de la esperanta literaturo la libro tamen estas grava, pro la jenaj tialoj:

1) Ĝi donas sufiĉan klarigon pri la bahaaj kredo kaj historio, ne jam haveblan en Esperantujo.

2) Ĝi donas detalajn informojn pri la ligoj inter Esperanto kaj bahaismo, per la konsilo ate de² ‘Abdul’Bahá kaj aliaj ante la lernadon de internacia lingvo, per la konataj esperantistoj bahaaj (i.a. Lidia Zamenhof, kiun mi renkontis en 1936 en Liono, Francujo), kaj per la nuntempa kunlaboro inter la du ismoj kaj inter la relative granda nombro da esperantistaj bahaanoj.

3) La aŭtoro donas interesan prisk-

1. *ante* = rilate.—[db]

2. = donita de.—[db]

ribon pri *kaj* kelkaj periodoj de la historio de Esperanto *kaj* sia propra ageneco¹ en la antaŭigo ante Esperanton.

4) La lingva kvalito estas tre bona: La stilo estas simpla (longegaj frazoj maloftas) kaj la propozicipartoj ĝenerale sekvas la naturan vicordon; enestas tre malmultaj neoficialaj vortoj, freŝa ŝanĝo el la nuna literaturo, taŭgiganta la libron por komencantoj en Esperanto; la uzo de la gramatikaj reguloj estas preskaŭ perfekta (same maloftaĵo en la nuna literaturo), malgraŭ kelkaj ankoraŭaj monstraĵoj: “-io” por landoj el popolanoj, “denove” por “ree”; ĉeflitero por popolano, akuzativo en la mezo de vortkunmeto

(“antaŭenigi” anstataŭ la ĝustaj “antaŭigi” aŭ “igi antaŭen”, “siofero” por “siofero”, ktp.), la enuiga manko de la akcentsigno ‘ sur “káj...káj”, la escepta apostrofigo de adverbo (“dank’al” por la ĝusta “danke al”).

Ege malmultaj estas la preseraroj, verŝajne ĉar la verkisto mem presis la libron kaj ĉar pluraj personoj kontrolis la tekston post unua preso.

Konklude do: bonstila kaj bonlingva libro kun multe da informoj pri bahaaismo, pri Esperanto, kaj pri la rilatoj inter la du ismoj, verkita de multlaboranto por Esperanto. La libro interesos multajn esperantistojn kaj helpos valorigi Esperanton en la okuloj de bahanoj. □

1. = “involvement”.—M.L.

Brian Curry

1947-2002

Nekrologas Terry Manley

La 7an de oktobro du eminentaj esperantistoj mortis en Sidnejo. Ralph Harry mortis ĉ. la 3a ptm kaj Brian Curry mortis je la 9.30 ptm. Ambaŭ en malsanulejoj.

Mi atingis Sidnejon veninte de Narromine ĉ. la 7a ptm je la sama tago, kaj post alveno en la domo de mia fratino decidis lasi miajn edzinon kaj filinon tie kaj viziti Brian-on en malsanulejo ĉe Alburn. Kvankam Brian estis morte malsana kun penega spirado helpata de oksigen-maŝino, li rulis sin sur la flankon kaj tenis miajn brakojn, agnoskante mian ĉeeston. Li ne povis paroli sed tiu ago de ege malforta korpo diris al mi pli ol multaj vortoj. Hana, la edzino de Brian, restis ĉe lia lito, kiel ŝi faris multfoje en la lastaj monatoj de lia malsano. Mi forlasis

ilin iom post la 9a ptm kaj Brian forlasis nin je la 9.30 ptm. Restu en paco Brian.

Brian Curry naskiĝis en Manlio en marto 1947. Li estis la sola infano de John kaj Joyce Curry. Li estis individuo kaj klera studanto en multaj kampoj, notinde matematiko kaj desegno. Li fabrikis siajn proprajn elektronikan orgenon kaj komputilon. Komputiloj estis kaj lia laboro kaj lia ŝatokupo. Li laboris lasttempe por la Kancer-Konsilio de NSK kiel komputilisto.

Laŭ karaktero Brian estis ĝentila kaj kompatema. Li ĉiam elektis siajn kristnaskajn donacojn per la grupo Komuna Helpo por Eksterlandanoj (Community Aid Abroad). Li malŝatis perforton kaj militismon. Li estis akti-

vulo en manifestacioj kontraŭ la Vjetnama milito en la 1960a jardeko. Li abonis al la Esperanto-grupo "Pacaktivulo".

Brian estis privata homo kiu ne faronis pri siaj partopreno kaj subtenado de tiaj grupoj. Li ege ŝatis marŝi en naturejoj, kiaj arbaroj kaj marbordoj, sen la bruo kaj detruo farataj de aliaj homoj. Plaĉegis al li kaj al Hana, lia edzino, la izoleco kaj naturo. Tial Brian subtenis mediajn protektajn grupojn kiaj "Verda paco" kaj la Aŭstralia Konservada Fonduso. Li iris al la monda verdula konferenco en Kanbero antaŭ du jaroj kaj helpis deĵori ĉe Esperanto-budo tie.

En la lastaj jaroj Brian havis grandan lukton fizikan pro hepata malsano. En 1995 pro tio li havis hepatan transplanton. En tiuj tagoj oni opiniis ke Brian ne longe postvivos la operacion, sed Brian estis ege volforta kaj obstina homo kiu ne facile cedis al la malsano. Li refortiĝis iom post iom kaj plu laboris, feris kaj marŝis en siaj plej ŝatataj lokoj. Finfine la korpo cedis kaj ne refortiĝis post kanceroperacio antaŭ 9 monatoj.

Brian estis tre klera esperantisto.

Li ofte studis la gramatikon en la vespero. Li tenis diplomon por la Supera Ekzameno de AEA. Li preferis babili kun esperantistoj en manĝejo aŭ dum arbarmarŝo pli ol prelegi en klubĉambro aŭ studi en klasĉambro. Li partoprenis en la UK en Varsovio en 1987 kaj esperantistiĝis 2-3 jarojn antaŭ tio. Li partoprenis ankaŭ en la UK de 1997 en Adelajdo.

Brian estis sekretario de la Esperanto-Federacio de NSK 1988-1994 kaj la vicprezidanto de tiu organizo dum 1995. Li estis UEA-a ĉefdelegito por Aŭstralio 1992-2002. Li verkis artikolojn por Aŭstraliaj kaj eksterlandaj gazetoj.

Dankon al vi Brian.

Dum mi marŝis en arbaro 2 tagojn post la morto de Brian kaj Ralph mi ridetis pensante ke ili "ĉielumas". Mi vere ne scias pri tiaj aferoj sed estis ĝojiga penso. Kvankam mia unua penso estis ke ili "ĉiel-umas" mi poste rimarkis ke oni povas apartigi la vorton ĉi tiel "ĉie-lumas". Kaj pri tio mi scias ke veras, ĉar per bonaj ekzemploj ja Brian kaj Ralph postlumas siajn vivojn kun ni. □

Ralph Harry

Nekrologas Marj Ellyard

La lastatempa forpaso de nia estimata Ralph Harry forprenis grandan figuron el la vivo de Esperanto. Dum la plejmulto de siaj okdekkvin jaroj li riĉigis la movadon, kaj aŭstralian kaj universalan. Kiel entuziasmulo por la lingvo li konstante kaj senlace verkis, tradukis, paroladis, instruis, kaj propagandis.

Li naskiĝis en Geelong, kie lia patro estis instruisto. Poste, lia patro trans-

lokiĝis al Laŭncestono, al privata kolegio, kaj tie Ralph edukiĝis, estante la plejsupera lernanto en ĉiuj siaj lernejojaroj. Tiu supereco daŭris kiam li fariĝis studento en la universito en Hobarto, studante la juron.

En sia tempo de loĝado en Krista Kolegio, li ekkonis Cedric Cowling-n, ardan esperantiston, kiu konigis al li la lingvon kaj donis al Ralph sian memverkitan lernolibron. Ralph trovis

ĝin fascina afero, kaj ene de sep tagoj eklernis la lingvon sufiĉe bone por verki artikolon pri vivo en Tasmanio, kiun lia mentoro sendis al kelkaj gazetoj. Li komencis korespondadon kun esperantistoj en Japanio, Rusio kaj Francio, kaj persvadis siajn fratinojn kaj kunulojn lerni kun li. Kiam li diplomitiĝis, li estis aljuĝita kiel Stipendiisto

ulo Rhodes por Tasmanio, kaj samtempe gajnis eniron en la registaran servadon. Li studis en Oksfordo por antaŭenigi sian ŝancon realigi sian elektitan karieron, fariĝi diplomato. Dum sia restado en Anglio li kontaktis esperantistojn kaj ĉeestis kelkajn lokajn kongresojn.

Malgraŭ multaj malfacilaĵoj kiujn la tiama milito kaŭzis en universitatoj, li sukcesis fini la studprogramon. Post malsukcesa provo aliĝi al la brita armeo, li revenis al Aŭstralio kaj eniris la lastatempe starigitan Departementon de Eksterlandaj Aferoj.

En 1942 li membriĝis en la aŭstralia armeo kaj estis postenigita ĉe Novgvineo, kie li servis kiel oficiro kaj analizisto de informoj. Post du jaroj li revenis al la Departamento, kaj estis sendita kiel tria sekretario al Kanado. En Ottowa li renkontis Dorotea-n, kiu fariĝis lia edzino.

Tiam li estis sendita al Novjorko kie, kun Herbert Evatt, li helpis pretigi la tekston de la *Deklaracio de Homaj Rajtoj*. Li multe admiris kiel la prezidanto de la komitato, Eleanor Roosevelt, kajolis la deligitajn verki la tekston kiu estis finfine akceptita. Poste, lia unua traduko en Esperanton estis de tiu impona dokumento.

Lia unua grava diplomata posteno estis en Ĝenevo, kiel konsulo kaj reprezentanto de Aŭstralio ĉe UN. En

tiu urbo li ekkonis multajn eminentulojn de la esperanta movado, inter ili Edmund Privat. La tiea Esperanto-societo estas tre vigla kaj Ralph fariĝis verva partoprenanto. Poste, kiam li estis Alta Komisiito en Singapuro, li aktivis en la loka movado, kaj multe helpis al la lokaj esperantistoj per instruado kaj propagandado. Kun aliaj amantoj de lia hobbio, briĝo, li ludis ofte en alilingvaj grupoj; tio instigis lin kompili esperantan terminaron por la ludo, kiun li poste eldonis.

Post lia reveno al Kanbero, oni petis lin, pro lia laboro in Novgvineo, preni la postenon de ĉefo de la lastatempe starigita ASIS. Li neniam parolis pri sia tempo en tiu posteno, sed tenis ĝin sekreta. Sed pro tiu servo li pasigis kelkajn jarojn en Melburno. Tie li helpis starigi fonduson por AEA por festi la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof. La fondusa mono donita estis pruntita al la melburna grupo por aĉeti kunvenejon.

Dum la sekvaj jaroj li loĝis en Kanbero, kie li aktivis en la kanbera klubo kaj strebis interesigi membrojn de la registaro pri Esperanto. Pro lia laboro oni eldonis esperantan version de la libro *Aŭstralio, koncizaj faktoj*.

En 1965 li estis sendita al Belgio, kie li estis tro okupata por aktivi, sed li ĉeestis kongresojn en Britio kaj Brazilo kaj gastigis multajn esperantistojn kiuj vizitis Bruselon. En vizito al Hungario li povis ĉeesti la internacian kongreson de juristoj kaj esperantigis la traktaton tie adoptitan.

Lia sekva posteno estis en Sajgono, kie la milito daŭradis. Sed li povis kontakti multajn lokajn esperantistojn. Tie liaj gefiloj, du filinoj kaj unu filo, ne rajtis akompani lin. Tiuj gefiloj estis edukitaj kaj en Kanbero kaj en

Eŭropo.

Poste li fariĝis ambasadoro en Germanio. Tie, invitite de la lokaj instancoj, li faris multajn esperantajn paroladojn pri la vivo en Aŭstralio. Por la Olimpikaj Ludoj tie, li kompilis broŝuron de frazoj por helpi la partoprenantojn ekkoni siajn kunludantojn. La frazoj estis en la angla, la franca, la germana kaj Esperanto. Oni disdonis ĝin tie kaj ankaŭ poste en Montrealo. Kun la esperantistoj de Eŭropaj landoj li strebis persvadi la instancojn agnoski Esperanton kiel la trian lingvon por tiu kontinento.

En 1975 li transposteniĝis de Germanio al Novjorko kiel la aŭstralia ambasadoro ĉe UN. Kiam la direktoro de Unesko konsentis ĉeesti la UK-on en Islando, li helpis lin per interpretado de la tie akceptitaj traktatoj de *Rajto al Komunikado*, por ke li ricevu bonan impreson pri nia movado. Li invitis la lokajn esperantistojn okazigi la Zamenhofan vesperan en lia oficiala apartamento. Li estis aktiva en la novjorka grupo ĝis sia emeritiĝo en 1978.

Reveninte al Kanbero, li denove aktivis en nia aŭstralia movado. Li estis prezidanto de AEA kaj patrono de UEA, partoprenis en ĉiu kongreso, kaj laboris por instigi kelkajn eminentulojn lerni la lingvon. Li deĵoris dum unu jaro kiel direktoro de la Instituto de Internaciaj Aferoj, kaj aranĝis ke nia aŭstralia libraro havu lokon tie.

Li tradukis eldonaĵojn de UN kaj UNESKO, kaj kunlaboris pri la eldonado de *Aŭstralia Antologio* kaj *Aŭstralia Vortaro*. Kiel la aŭtoro de *Aventuroj en Esperantujo* kaj *La Diplomato kiu Ridis*, li provizis al ni interesajn perspektivojn de sia laborema kaj fruktodonanta vivo.

Lia forpaso lasas profundan truon

en nia movado, kaj ni akre sentos la mankon de lia saĝa kaj donema personeco.

Adiaŭ Ralph!

Terry Manley aldonas:

Ralph ricevis honoran doktorecon de Universitato de Tasmanio. Du fojojn li estis prezidanto de AEA, 1960-61 kaj 1980-84. Li estis fondprezidanto de Kanbera Esperanto-Klubo en 1952, kaj prezidis 1961-62 kaj 1980-85. Li elektiĝis Dumviva Membro kaj Honora Patrono de UEA en 1967. Li ricevis la Honor-Insignon, Fratulo de AEA en 1976 pro elstara laboro por AEA kaj por Esperanto ĝenerale.

En 1984 Ralph sukcesis kun honoro ĉe la Norma Klereca Diplomo de AEA kaj fariĝis ano de la Ekzamena Komisiono de AEA. Li multe verkis en Esperanto.

Marcel Leereveld aldonas:

“Mi sukcesis enkonduki Esperanton kiel matrikulekzamenon en Tasmanio nur pro lia helpo: li speciale flugis al Hobarto por persvadi, sukcese, la edukajn kaj universitatajn respondeculojn tieajn.”

Donald Broadribb aldonas:

Mi unue renkontis Ralph Harry-n perkoresponde, kaj poste dum somerlernejoj kaj AEA-kongresoj. Li fariĝis ne nur bona amiko mia, sed ankaŭ tre valora konsilanto. Politike li estis konservativa, sed tio ne malhelpis diskutojn ankaŭ tiutemajn. Mi bone memoras piknikon de li kaj mi, dum bela somera tago en Adelajdo, kiam ni longe diskutis Vjetnamon, praktikajn sociajn problemojn en Aŭstralio, la belecon/nebelecon de diversaj monumentoj kc. Neniaj forgesablaj estos li, por mi mem kaj por multaj aliaj. □

Vintraj eventoj

de Franciska Toubale

La 75a kongreso de Sennacia Asocio Tutmonda

La 75a kongreso de SAT okazis en Alikante, Hispanio, je la unua semajno de julio. Partoprenis pli ol 150 esperantistoj el 18 landoj, ĉefe eŭropaj. Ĉeestis nur unu esperantisto de Azio, fakte de Japanio (grupo de ĉinoj ne ricevis vizon) kaj unu de Afriko, de Malagasio, ĉar same la esperantistoj de Algerio, Ganao kaj Nigerio ne ricevis vizojn. Entute 60 personoj ne rajtis ĉeesti. Ĝi okazis en universitato, kio estas tre bona kondiĉo ĉar ne estas granda distanco inter la dormoĉambroj, la manĝoĉambroj kaj la kunvenĉambroj, do ne estas perdo de tempo kaj tio faciligis la interparoladon ekster la kunsidoj.

La problemoj menciitaj en la raporto de la plenumkomitato estis pri-traktitaj, interalie la malkresko de la membraro, la malfacila vendado de la libroj eldonitaj de SAT, kio malhelpas novajn eldonojn, la sorto de niaj kamaradoj enkarcerigitaj kaj en Rusio kaj en Usono, kio instigis novan deklaron kontraŭ mortpuno.

En la posttagmezo kunvenis diversaj frakcioj: liberecana, komunista, anarkiista, ekologia, la distribua ekonomio, k.t.p. Prelegis Zafia Banet



SATanoj debatas eĉ sur la strato

Formal pri sia libro *La familio de Zamenhof*, Natalia Arolovich pri Salvador Dalí, Augusto Casquero pri la lingvoj en Hispanio, Miguel Fernández “Sur la spuroj de Frederico García Lorca”. Li ilustris sian paroladon per kantoj, kiujn li mem kantis kun emocio.

Mankis nek ekskursoj por malkovri la ĉirkaŭaĵon nek distraĵoj, dank’ al la fama pola artisto Jerzy Formal, loka grupo kiu prezentis folklorajn dancojn, kaj la hispanaj esperantistoj kiuj transformiĝis al la taŭroj de Sankta Firmín kaj ŝerce timigis la homojn en la koridoroj de la universitato.



Sveda prtoprenanto bickiklis de Barcelono



Danco instigita de japana ĉestanto

Sed la grava era de la kongreso, kiu trafas ankaŭ la neĉeestantojn kaj la tutan esperantistaron, estis la inaŭgu-

ro de la nova *PIV*, dum kiu Michel Duc Goninaz mem klarigis en kiuj kondiĉoj ĝi estis redaktita.

Vizito al la londona klubo

Dum mia restado en Eŭropo, mi sukcesis ankaŭ viziti la londonan klubon. Ĝi situas nun apud Stacidomo Euston, do ankoraŭ en la centro de la urbo. La klubanoj kunvenas ĉiun semajnon vendrede en la vespero. Unue ili aŭskultas prelegon de iu klubano, kaj post tepaŭzo ili dividiĝas en du grupojn: unu kiu kantas, kaj unu kiu diskutas pri problemoj proponitaj de la ĉeestantoj.

Sed pro tio ke en aŭgusto multaj esperantistoj ferias, la vizitantoj estis tiom nombraj kiom la klubanoj, do la prelego estis anstataŭigita per prezentiĝo de la vizitantoj: unu viro de Nederlando, akompanita de du polinoj, du irakanoj, unu paro de Germanio (sed la sinjorino devenas de Tajikio. Ŝi publikigis kolekton de anekdotoj kaj

pro tio estis invitita al la Barlastona semajno, apud Birmingham, por gvidi kurson), kaj ni du aŭstralianoj. Pro la anonco ke ni ne rajtas debati pri politikaj, rasaj, aŭ religiaj aferoj, mi elektis la kantadon. La celo estis prepari koncerton kiu okazos jam en oktobro. Gitaristo kaj pianisto akompanis la kantemulojn.

Kiam venis la horo de la fermo, la diskutantoj ne deziris ĉesigi. Tre interese estis aŭdi la vidpunkton de la irakanoj kaj de usonano nun loĝanta en Anglio, pri la usona/iraka konflikto, des pli ke ili diskutis sen pasio, kun atento al la diraĵoj de kontraŭuloj.

Se vi iam trairos Londonon, nepre vizitu la klubon. Ili ŝatas havi la viziton de eksterlandanoj.

La 3a Azia Kongreso

Se oni flugas de Parizo al Melburno, kial ne halti survoje en Seulo por ĉeesti Azian Kongreson kaj revidi gemikojn de Azio? Tion ni faris, kaj kongresis en Seulo de la 23a ĝis la 26a de aŭgusto 2002, kune kun 550 esperantistoj de dek ses landoj. Tamen la plimulto venis aŭ de Ĉinio, aŭ de Japanio aŭ de Koreo. Bedaŭrinde estas, ke kelkaj samideanoj ne ricevis vizon por ĝui la aferon.

Dum kvar tagoj, granda, moderna konstruaĵo kiu staras meze de la urbego apud palacoj, la Kulturcentro Sejong — tiel nomita honore al la kreinto de la korea alfabeto — iĝis la renkontoloko de la esperantistoj. Ili okupis la salonojn Zamenhof, Elpin, Halpin aŭ

Solpin¹ por debati pri la kongrestemo: “Interkompreniĝado inter kulturoj”, informiĝi pri la movado en Azio, malkovri novajn spertojn kiajn banana papero, abaka kalkulado, palindromoj, aŭ paperfalda arto, ĉeesti religiajn renkontojn ĉu oomotan, katolikan aŭ bahaan, kanti, studi aŭ en la kongresa universitato aŭ en la kursoj de AIS-o (Akademio Internacia de la Sciencoj). Ankaŭ distraĵoj estis planitaj: puppeteatro, koncertoj de Ĵomart kaj Nataŝa, miksaĵo de akrobatado kaj militarto de nekredeble sperta grupo de

1. Elpin, Halpin kaj Solpin estis eminentaj koreaj esperantistoj kaj ankaŭ pacaĵ batalantoj por la liberigo de ilia lando.

junuloj el Ĉinio.

Ĉiutage *La lanterno azia* diskonigis la novaĵojn kaj necesajn informojn.

Fruktodona kongreso

La 3a Azia Kongreso estis por mi fruktodona kongreso. Je la interkona vespero, la homoj kiuj sole aŭ duope venis, devis aparte sin prezenti al la ĉeestantaro. Bernie kaj mi estis inter tiuj. Pro tio, poste multaj homoj venis al ni, kaj kelkaj el ili petis nin raporti pri ilia deziro krei rilatojn kun Aŭstralio.

Unu el ili estas sinjoro Brilavoj Li, prezidanto de Esperanto-Asocio de Yanbian kaj estro de la Komerca Kompanio Yanbian Sanyuan. Li deziras organizi interŝanĝon de studentoj. Li kontakteblas ĉe: 51-2-11 Xinhua str. Yanji City, Jilin provinco, Ĉinio; Brilavoj@yahoo.com.cn kaj Brilavoi@hanmail.net.



Kun Han Zuwu

La urbo Tianjin estas ĝemela urbo de Melburno. La vicprezidanto de la Tianjin-a Esperanto-Asocio, sinjoro Han Zuwu, bedaŭras ke malgraŭ tio, rilatoj inter la du urboj ne ekzistas. Ĉu eblos ilin krei? Sinjoro Han Zuwu aktivas en multaj kampoj. Li estas ankaŭ vicprezidanto de Ĉina Fervoja Esperanto-Asocio, konstanta konsilanto de Ĉina Esperanto-Ligo, membro de Internacia Rajtigita Ekzamenantaro, membro de IFEF kaj ILEI, fak-delegito de UEA pri fervojoj kaj instruado.

Finfine invitas al sia lando, nuntempe Tajvano, ĉiun interesaton Reza Kheirkhah. Instruistoj de la angla lingvo estas ege bezonataj en Tajvano. Do li instigas ĉiun veni por samtempe instrui la anglan lingvon kaj kreskigi la nombran de esperantistoj. Li insistas ke la vivo tie estas tre agrabla, la loĝantoj afablaj, la plaĝoj belaj. Por scii pli, eblas viziti lian hejmpaĝon je la adreso: <http://kheirkhah.tripod.com> Lia poŝtadreso estas Ping Tung-shi, Chung Ching road, 105, 900 Taiwan, kaj lia retadreso: rezamenhof@yahoo.com.

Jen okazoj praktiki la lingvon kaj malfermi vian mondon pere de Esperanto ĝis la 4a Azia Kongreso en Nepalo.

NZEA Kongreso 18 - 21 aprilo 2003

Planado daŭras por la kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio en Christchurch dum la kvar tagoj 18-21 aprilo. Ni elektis temon: “Ĝuu Esperanton” kaj, en tiu spirito, ni aranĝas por la kvara tago bus-vojaĝon al la alloga marborda urbeto Akaroa. Ni ankaŭ havos bankedon. Tamen, pli formalaj aferoj okazos dum la aliaj tri tagoj kune kun distraj aferoj en la vesperoj. Ni invitis, kiel specialan gaston, Franciska Toubale-n de Aŭstralio, kiu helpos pri instruado kaj konversacio.

Bonvolu memori ke aliĝiloj devas atingi la LKK sekretarion, Dave Dewar, antaŭ 28 februaro (por eviti aldonon al la kotizo).

Personoj en NZ devas pagi kun la aliĝilo; tamen personoj de aliaj landoj rajtas pagi nur kiam ili atingas la kongreson.

Por aliaj detaloj vidu la novan retejon de NZEA: www.esperanto.org.nz aŭ kontaktu: Dave Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004. gddevar@ihug.co.nz □

La somerlernejo Niaj instruistoj

intervjuas Terry Manley

Gràzina Opulskiene:

Kie vi plenkreskiĝis?

Mi naskiĝis en Litovio kaj ĉiam loĝis en Litovio nur la unuajn 32 jarojn en Sovetunio kaj la lastajn 12 en sendependa lando. Sed kion scias la aŭstralanoj pri tiu lando? Eble ili jam aŭdis, ke en 2005 tio estos lando de UK, kaj mi planas rakonti pli dum prelego en la kursaro.

Kie vi iris al lernejoj?

Jes, multe pli longe ol mi ŝatis tion fari, sed ne sufiĉe longe kiel evidentiĝas nun... ĉar daŭre mi scias tro malmulte. Mi diplomigiĝis kiel inĝenierino pri prilaboro de metaloj kaj dum 17 jaroj laboris en fabriko. Post la disfalo de Sovetunio la fabriko bankrotis en 1992 kaj mi iĝis senlabora. En 1994 mi komencis labori en mezlernejo kie mi ĝis nun laboras, kaj en biblioteko, kaj kiel instruistino de Esperanto.

Kiam vi komencis lerni Esperanton?

En 1990 mi sekvis kurson, sed vere komencis interesiĝi en 1992.

Kiajn aliajn interesojn vi havas?

Esperanto estas ĉefa, sed mi ŝategas vojaĝi kaj ofte estas en interesaj esperantaj aranĝoj, multe legas, multe trikas, volonte biciklas, sensukcese lernas la anglan :-). Mi havas stultetan, sed unikan kolekton de porkoj-ŝparujoj kaj multe da tempo pasigas korespondante kun amikoj esperantistaj.

Kie vi instruis dum la pasinta jaro? Pri kio vi instruos?

Mi konstante havas tri grupojn de gelernantoj en mia lernejo, kaj kiam mi estas en Esperantujo mi malmulte instruas jam pro deziro ŝanĝi la okup-

on. Vera instruado estis en Zagrebodum la UK, kaj mi iomete kunhelpis en Internacia Festivalo en Germanio. Tiu festivalo ĉiam okazas la 27an de decembro-3an de januaro kaj, ankaŭ al Aŭstralio mi flugos rekte de Germanio. En la somerkursaro mi instruos al komencintoj, ĉefe celante paroligi la kursanojn, kaj mi uzos por tio amuzan libreton detektivan de M. Bronŝtejn, ludojn, kaj skeĉojn de St. Macgill. Ĉar por nivelo 3a mi estos kune kun fama gramatikisto, M. Leereveld, do en mia parto de la lecionoj ni ne gramatikumos, sed per materialo, bazita sur tekstoj de la ĵurnalo *Litova stelo*, ni celos esplori la lingvon kaj firmigi gramatikajn konceptojn. Nepre dum lecionoj ni trovos tempon por iom ludi, amuziĝi, aktori.

Franciska Toubale:



Kie vi plenkreskiĝis?

Mi naskiĝis en la ĉefurbo de Bretonio, Rennes. Mi pasigis miajn unuajn jarojn en apuda vilaĝo, Cesson Sévigné, en la hotelo de mia avino, kie loĝis soldatoj de Britio kaj Usono, rifuĝintoj de Hispanio kaj Portugalio, ĉar tio komenciĝis en la dua mondmilito en 1943. Eble pro tio mi ĉiam sentas min komforta en internacia rondo.

Kie vi iris al lernejoj?

Mi iris unue al infanĝardeno de la kvartalo same kiel la geknaboj kiuj tie loĝis. Miaj gepatroj kutimis translokiĝi ĉiun trian/kvaran jaron al alia parto de la urbo. Pro tio mi devis ŝanĝi ankaŭ la lernejon ĉiun trian/kvaran jaron kaj povis konservi nek amikojn nek ŝatatajn okupojn. En tiu tempo la transportiloj ne estis tiom nombraj, kaj malmulte da homoj posedis aŭtomobilon. Mia patro laboris por la Nacia Fervoja Kompanio, do estis pli facile vojaĝi per trajno tra Francio ol tra la urbo mem. Mi sekvis tiel nomatajn klasikajn studojn (lernado de la latina, angla, germana) en la loka liceo, kaj poste sukcesis la konkurson por eniri apartan kolezion cele trejnadon pri instruado al infanoj de bazaj lernejoj. Mi plustudis en Parizo kaj iĝis instruistino de mezlernejo pri ĉefe la angla. Tiam mi edziniĝis kaj pro la rifuzo de mia edzo militservi, ni foriris al Alĝerio, kie mi loĝis dum dek ok jaroj, instruante la anglan, la francan k.t.p. Mi konatiĝis kun nova kulturo kaj nova lingvo — la araba — tie kaj naskis kvar infanojn. Pro la politikaj konfliktoj en Alĝerio, mi revenis al Francio en 1986. Por mi estis granda ŝoko, ĉar ne estis mia elekto, kaj neatendite, kvankam mi loĝis en la domo de mia avino en nun urbeto — intertempe la vilaĝo grandiĝis — la homoj konsideris min kiel fremda. Do kien iri por senti sin hejme kaj esti rekonita kiel samlandano?

Kiam vi komencis lerni Esperanton?

Mi unue aŭdis pri Esperanto en la kolegio por instruistoj kaj trovis stulta tiun ideon anstataŭigi ĉiun lingvon per nur unu. Mi ŝatis lerni fremdajn lingvojn. La malfacilaĵoj estis por mi defio, plezuro.

Nur en 1989 mi decidis lerni Esperanton por scii ĉu ĝi vere estas lingvo, ĉar mi dubis ke nur unu homo povas krei tiom kompleksan aĵon. La lingvo mirigis min. Mia instruisto instigis min tuj partopreni kongresojn kaj renkonti fremlandanojn, korespondi, eĉ petis min lin anstataŭi, dirante ke li estas malsana, aĝa, kaj laca. Mi konsentis post iom pli da studado.

Mi emeritiĝis en 1991 kaj komencis instrui Esperanton. Mi renkontis homojn kun nekutimaj interesoj, dank' al kiuj mi malkovris multe da nekonataj kampoj. Iom post iom mia mondo plilarĝiĝis pro Esperanto.

Kiajn aliajn interesojn vi havas?

Ŝajnas grave al mi evoluigi la intelektajn, fizikajn, spiritajn kapablojn samgrade. Pro tio mi ankaŭ piedmigradas kiel eble plej ofte, regule praktikas japandevenan militarton *aikido*, dancas laŭ ĉiuj ritmoj, ĉu keltaj, ĉu arabaj, ĉu latinamerikaj, ĉu parizaj. Por ne forgesi mian denaskan lingvon, mi estas membro de la Melburna Franca Teatra Kompanio kaj atrumas du fojojn en la jaro. Mi estas ankaŭ membro de la Ŝekspira Societo en Melburno kaj aktoras ankaŭ kadre de tiu societo.

Kie vi instruis dum la pasinta jaro?

Mi gvidis kurson ĉiun mardon en la Centro por Edukado de Plenkreskuloj (CAE: Centre for Adult Education). Tiu kurso komenciĝis post la somerkursaro en Melburno en 1999, laŭ peto de la tiamaj komencantoj. Mi instruis ankaŭ dum dek tagoj en Vjetnamo sep horojn tage, matene en privata universitato al entuziasmaj gejunuloj, kaj posttagmeze en komunuma centro al lernantoj de ĉiuj aĝoj, kaj dum semajno en marborda urbeto de Bretonio, Pluezec.

Pri kio vi instruos?

Mi supozas ke mi ne bezonas klarigi pri kio mi instruos la komencantojn. Por la tria nivelo, mi celas allogi tiujn esperantistojn, kiuj sufiĉe bone konas Esperanton, sed ne havas sufiĉe da oportunoj por praktiki la lingvon, pro izoleco aŭ aliaj kialoj, kaj doni al ili la ŝancon multe paroli. Mi elektas kiel deirpunkton tekston de fama esperantisto aŭ Esperanto-verkisto. Tiu teksto estas preteksto por diskuti, pripensi unu socian problemon, k.t.p.

Atilio Orellana Rojas:*Kie vi plenkreskiĝis?*

Mi naskiĝis en Argentino, norde en la lando, en tre turisma regiono fama pro sia termakvo. Estante 18-jara mi translokiĝis al la centra regiono, al la urbo Córdoba, kaj tie mi studis. Tiutempe mi intencis estiĝi katolika pastro kaj tial mia edukado estis en seminario lernante pri filozofio kaj teologio. Mezvoje mi rezignis pri tia vivo kaj elirinte la monaĥejon, mi komencis miajn studojn pri filologio en la Universitato.

Kiam vi komencis lerni Esperanton?

Estas verdire en tiu periodo de mia vivo ĉe la seminario, kiam mi eklernis Esperanton (en 1984) kaj de tiam mi

neniam ĉesis okupiĝi pri la lingvo kaj la movado, unue agante en mia propra urbo, en la lando kaj finfine ankaŭ en internacia medio.

Kiajn aliajn interesojn vi havas?

Kiam oni demandas al mi pri miaj “kromaj” interesoj, mi estas ĉiam iom embarasita, ĉar Esperanto okupas tiom de mia vivo, ke mi apenaŭ havas spiron por io plia. Iam mi ludis teatraĵon ĉe amatora grupo (kaj eĉ sukcesis gajni premion pro la aktorado en teatraĵo de Federico García Lorca), mi ankaŭ tre diligente kolektis poŝtmarkojn, ktp. Nuntempe mian tempon, kiel dirite, okupas multe miaj taskoj en la movado en tre diversaj kampoj, sed tio ne sukcesis forbalai mian daŭran intereson pri ĉapeloj kaj ĉapoj de diversaj popoloj de la mondo, kaj mian plezuron ĉe spektado de filmoj.

Kie vi instruis dum la pasinta jaro?

Kie mi instruis en la lastaj 12 monatoj? Dum miaj Esperanto-vojaĝoj mi ne ĉiam okupiĝas pri instruado. Foje temas pri vizito al la Esperanto-klubo, al la lokaj organizoj, pri prelegado, ktp. En tiu ĉi lasta periodo de 12 monatoj mi estis pro Esperanto en, ekzemple, Norvegio, Brazilo, Malajzio, Belgio, Germanio, Britio, Finnlando, Svisio, Francio kaj Svedio.

□



**POR RIDIGI
VIN**



Sekretariino alvenas, la trian fojon, tre malfrue al la oficejo. Vokas ŝin en sian oficejon la oficestro dirante: “Nu Eileen, mi scias ke vi kaj mi antaŭ nelonge, ktp., sed tio jam finiĝis. Mi volas ke vi konduku same kiel ĉiuj aliaj dungitoj ĉi tie. Kiu diras ke vi povas veni kaj foriri laŭ via plaĉo?”

Riditis Eileen, kaj ekbruliginte cigaredon, respondis: “Mia advokato”.

□

[El Tamen Plu]

...Kun Esperanto vi estas amiko

de Horvath Sandor

Horvath Sandor el Aŭstralio vizitis Korean Respublikon dum 2 semajnoj. Jen kelkaj pensoj kaj sentoj de li.

Post kelkaj horoj mi forlasos Koreon. Mi ankoraŭ pensas pri la hieraŭa montgrimpado al Dobong-San: la kolorplena, bela aŭtuna pejzaĝo, la feliĉa etoso, la freŝa aero, la bongusta manĝado.

Estis mia unua vizito en via lando, fakte mia unua en iu Azia lando. Mi ne forgesos la du semajnojn.

Bonsance mi alvenis je la tago de *hangul*. Nekredeble. Lando kiu festas sian alfabeton! Bedaŭrinde, la tago ne plu estas nelabora tago. Kiel vi povis lasi ke tio okazu?

Kelkaj ĝeneralaj impresoj:

Seulo estas tro granda. Mi pasigis multe da tempo en la metroo — entute 21 horojn.

La publika transport-sistemo tre bone funkcias. Tamen kiel biciklisto mi ne certas kiel mi fartus ĉi tie. Verŝajne mi ne biciklus.

La daŭranta entuziasmo pri la Piedpilka Mondpokalo.

La “unueco” de vizaĝoj sur la strato. Videblas tre malmulte da nekoreaj vizaĝoj.

La frenezo pri porteblaj telefonoj. Mi nur renkontis unu personon kiu *ne* havis mantelefonon (kuraĝa Kuraĝo).

La interesaj vendistoj en la metroo.

La KEA prezidanto tre bone zorgis pri mia itinero. Unue mi devis al-kutimiĝi al la ideo ke aliulo kunmetas mian itineron... finfine mi akceptis tion kun granda honoro.

Mi certe spertis aferojn, kiujn mi ne spertus sen esperantistoj:

Mi partoprenis en la Esperanto-

klasoj ĉe Universitato Dangoon en Seulo kaj Ĉonan. Vidi tiom da studentoj lerni nian lingvon estis nekredebla, ĝojplena sento por mi kaj vere kuraĝigis min. Pri simila klaso en Aŭstralio ni nur povas revii. Tamen mi estis tre konscia kian grandan defion havas Ŝlosilo por instrui — kelkfoje, pli ol 90 studentojn en unu klaso.

Dum mia 5-taga rondvojaĝo mi vere spertis la malavaran kaj donaceman sintenon de multaj esperantistoj kaj vidis multajn interesajn lokojn.

Kelkaj kulminoj: La “skatola” esperanta oficejo en Ĉonan. Ĝi konfirmis al mi la kreeman spiriton de esperantistoj.

Infanĝardeno kaj pafarkejo en Daegu (*ne* en la sama loko!).

La korea historio en Kyongju.

La ŝajne senfina energio de Natura en Busan.



Vintro, Sandor, Studema

La montgrimpado kaj la vizito al la Nacia Universitato de Busan.

Unue mi ne tre ŝatis la ideon de karesnomo por esperantistoj, sed post kelkaj tagoj mi konkludis ke ili tre taŭgas por Koreanoj. Tiel ili ne devas atenti pri rangoj, aĝoj, ktp. Krom tio oni ankaŭ renkontas multajn novajn esperantajn vortojn.

Do multajn koran dankon al Ŝlosilo, Orkido, Ĝoja, Vintro, Salo, Studema, Johano, Ĉarma, Luma, Boko, Kuraĝa, Mevo, Leporo, Urso, Astro, Oha, Kano, Pelikano, Nicer, Ardeo, Diablo, Amato, Eminentia, Ondo.

Mi ankaŭ ne trovis respondojn al kelkaj demandoj:

Kiel funkcias la konfuza korea adressedo? De kie ĝi venis?

Kial oni ne povas/devas trinki la akvon el la krano?

Ĉu Verda Partio ekzistas en Koreo? Kie?

La afiŝo pri spionkaptado en la metroo ŝajnas ege amuza. Ĉu vere nur amuza?

Kompreneble, post du semajnoj mi nur tuŝis la surfacon. Tamen mi sentas ke mi lernis kaj spertis multe pli pri Koreo ol anglaparolanta vizitanto.

Esperanto estis kvazaŭ protektanta ŝirmo ĉirkaŭ mi. Pro Esperanto mi ne havis eblecon senti min eĉ iomete



Orkido, Horora, Kuraĝo, Ŝlosilo, Sandor

soleca. La rilatoj kun esperantistoj estis kreitaj tre rapide. Rilatoj, kiuj alimaniere postulus pli multe da tempo.

Unu mesaĝo al komencantoj kaj lernantoj de Esperanto. Ne timu! Parolu! Parolu! Parolu! Mi konscias ke tio estas malfacila, speciale antaŭ spertuloj. Tamen estas pli bone paroli kun eraroj ol silenti. Ĉiuj faras erarojn.

Fakte vi bezonas erarojn por plibonigi vian lingvokapablon. Ili povas helpi vin lerni. Do, ŝatu, ĝoju kaj amu viajn erarojn. Ankaŭ mi. (Trovu ilin!)

La lastaj du semajnoj certe tre forte konfirmis por mi la jam konatan sagon:

Kiam vi vojaĝas per la angla vi estas turistito, kiam vi vojaĝas per Esperanto vi estas amiko.

Mi esperas ke mi iam povos redoni vian grandegan gastamecon al kelkaj de tiuj malnovaj kaj novaj amikoj.

sandor.horvath@unisa.edu.au □

Pri la “konfuza adres-sistemo” de Koreo...

Ĝenerale orient-azianoj skribas la adreson laŭ la ordo de la granda regiono al la malgranda kvartalo, tute male de okcidentanoj. Pro tio, se vi vidas normalan adreson skribitan en la korea, vi povus legi tute male de la fino ĝis la komenco. Sed, se koreanoj skribas la adreson en la latina alfabeto, ili ofte inversigas la skrib-ordon... Supozeble, tia skrib-sistemo ne estas via demando.

La vera konfuzo estas la fakto ke koreanoj neniam uzas la nomon de la vojo por la adres-sistemo. Tio devenas de malnova sistemo de la japan-imperiisma periodo, kiam japanoj volis ŝteli gajni la teron de Koreo. Ili numerigis la tutan duoninsulon (tian numeruman sistemon oni nomas “ter-

numerado”), kaj laŭ tiu numerado ili regis kaj gajnis Koreon. Tiu ter-numera sistemo estas pli efika por aĉeto kaj vendo.

La korea historio tute rompiĝis kaj perdis kontinuecon pro la japan-imperiisma periodo, eĉ pli pro la sekva milito korea. Post la milito, la koreanoj devis vere rapide rekonstrui la tutan duoninsulon, kaj ili senĉese devis kuri antaŭen, preskaŭ senpense kaj blinde. Pro tio, la koreanoj ne volis pripensi la antaŭ-japan-imperian sistemon por la moderna Koreo, sed simple ili sekvis la japanan sistemon. Do tiu konfuza adres-sistemo ankoraŭ restas en la lando. (Tute kontraste, nuntempe la japanoj uzas voj-nomojn por sia adres-sistemo.)

Lastatempe, oficistoj de la korea registaro “sciigis pri la fakto” ke la “voj-nomo” pli bone funkcias por la adres-sistemo, kaj ili iom post iom por-

vas puŝi la sistemon al tiu direkto. Mia kvartalo, Kangnam-Gu en Seulo, unu el la plej avangardaj kvartaloj, lastatempe nomis ĉiujn vojon kaj vojeton. (Antaŭ tio, vojetoj estis tute sen-nomaj.) Kaj metis voj-montrilojn kun la nomoj, sur ĉiuj vojetoj.

Sed vi vidu, la plejmulto da koreanoj ne konas tiun voj-noman adres-sistemon. La plejmultaj koreanoj simple supozas ke la ĝisnuna ter-numera adres-sistemo estas tre “natura” sistemo, ĉar ili neniam vidis alian sistemon pli bonan.

Pro tio, koreanoj ne kutimas je memorado de voj-nomo. Ili simple memoras la lok-nomon aŭ “domegnomon” por voj-montrado. Do la nuna klopodo de la registaraj oficistoj vere malrapide realiĝas.

Amike via, Nomota. (Unu el tiuj interesaj karesnomoj, ĉu ne?)

Nomota KIM [nomota@mobigen.com] □



OSIEK-PREMIO 2002

En 2002 la OSIEK-anoj proponis 21 verkaĵojn premiindajn: ĉiuj estis prezentitaj en la junia numero de *La Gazeto*. La 26an de julio, dum la IEK en Leuven, Belgio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al

Kreŝimir BARKOVIĆ

pro traduko de:
7000 Tagoj en Siberio de K. Ŝtajner

Gratulon!

La premio, 500 eŭr., rekomencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkaĵo ne fikcia aŭ pro grava traduklaboro.

krokizo de Mэгumi Sacho-Komamura

informoj: *La Gazeto*, 55210 Creuэ, Francio kaj <http://osiek.org>

Por ridigi vin

Mastrino dungante novan ĉambristinon, demandas: “Diru, mia kara, ĉu vi amas papagojn?”

“Ne maltrankviliĝu, sinjorino, mi manĝas ĉion.”

[El *Eventoj*]

For the Beginner

Is *varma* hot or warm in English? Ĉu *hot* estas *varma* aŭ *varmega* esperante?

by Brendan Linnane

According to the original Esperanto dictionary, *varma* is *chaud* in French, *warm* in English, and *warm* in German. The problem is that the range of meaning of these three words is not identical.

The French *chaud* includes the English *warm* and *hot*.

The German *warm* is warmer than the English *warm*. German also has *heiß*, the approximate equivalent of the English *hot*.

French lacks such a word.

In Danish the word is *varm*, and Danish also has the word *hed*, similar to the German *warm* and *heiß*.

A *hot meal* in English is translated as *repas chaud* in French, and as *warmes Gericht* in German, and as *varm mad* in Danish.

A *hot chocolate* is *chocolat chaud* in French, *heiße Schokolade* in German, and *varm chokoladedrik* in Danish

I looked at the definition of *chaud* in *Petit Larousse*: “Qui a ou donne de la chaleur” = Which has or gives heat. *Chaleur* is then defined “Cause qui a pour effet d’élever la temperature, de dilater, fondre, volatiliser, ou décomposer un corps”. This is almost exactly the definition in *PV* of *varmo*: “fizika fenomeno, kaŭzanta en korpoj ŝanĝon de volumeno (dilatiĝo), au de stato (fluidiĝo k vaporigi)”

In *Nova PIV*, *varmo 2* is “alta tem-

peraturo.”

Larousse goes on: “chaleur animale: chaleur produit par les réactions de catabolisme”, and *Nova PIV* has “La animala varmo produktata en vivantaj korpoj per la interna katabolo” (As an aside: *PV* says: “per interna brulado”. An easily understood, *Fundamenta* root is too simple for *Nova PIV*.)

Following these definitions, it usually takes heat, rather than warmth, to melt or vaporise. In English we would also say “The heat produced by metabolism”. Warm in English is associated with comfort and satisfaction, not just temperature. The “warm” clothes of winter, become the “too hot” clothes of summer.” I feel “warm and snug” in my cosy home.

PV: *Varma*: “produktanta sur la palporganoj la karakterizan sentumaĝon, kiun produktas fajro”. *Nova PIV*: *Varma*: “estiganta la karakterizan sensaĝon, kiun produktas fajro”. Well, that feeling would have to be heat in English, and normally fire would be described as hot.

Examples of use are given in *PV*: (and my translation):

varma forno, hot oven / warm oven
varma plado, hot dish
varma supo, hot soup
varma suno, hot sun
varma klimato, hot climate / warm climate

varma ĉambro, warm room / hot room

varma vetero, warm / hot weather
la animaloj kun varma sango, warm-blooded

ĉu hodiaŭ estas varme au malvarme^Z is to-day hot or cold?

varmigi akvon, heat water or warm water.

la fajro brulis tiel bele kaj varmigis tiel agrable^Z the fire.... heated

Futher on: (PV) Malvarmo = fizika fenomeno, inversa de la varmo. In English: cold = physical phenomenon, the opposite of heat.

(Nova PIV) Malvarmo = sento inversa al varmo. In English: feeling opposite to heat.

The basic concepts in English are hot and cold, corresponding to the basic alternatives varma and malvarma in Esperanto.

According to *Nova PIV*, varmega is: 1 "tia, ke ĝia temperaturo estas multe pli alta, ol tiu de nia korpo."

According to *Merriam-Webster Collegiate Dictionary*: hot 1a: having a relatively high temperature; b: capable of giving a sensation of ; c: having heat in a degree exceeding normal body heat; 3: having or causing the sensation of an uncomfortable degree of body heat.

So comparing the definitions, varmega is too extreme to be the normal translation for hot.

I also had a little look around the Internet for examples of current usage, and thought of how we would express the idea in English:

"Vetero estis varmega (42° C, 65% da humideco) sur stratoj kaj strandoj, sed en hoteloj, kongresejo, busoj kaj vendejoj oni prizorgis freŝan aeron kaj ĉie en la kongresejo estis disponebla

trinkakvo." = English: extremely hot.

<http://www.volny.cz/malovec/start400.htm>

"Venuso estas iomete pli malgranda ol Tero, sed multe pli varmega: la temperaturo sur la supraĵo de Venuso estas sufiĉe varma por fandi plumbon!" = English: "but much hotter", and "hot enough to melt lead"

<http://www.geocities.com/kalblando/enc/v/venu>

"Kategorio B lavpelo kun varma akvo enĉambre, sed duŝejoj kaj necesoj trans la koridoro. La prezoj inkluzivas matenmanĝon." = English: hot water

<http://www.kava-pech.cz/ifef-kongreso/informilo.htm>

"La geinfanoj manĝas cerealon kun varma lakto, buterpanon kaj konfitaĵo". = English: hot milk [Laŭ Zamenhof ne troviĝas "geinfanoj"]

<http://www.verdadrako.50g.com/asap/13raport.htm>

"Nia Suno aspektas flava, ĉar ĝia surfaca varmo estas 6.000 gradoj. La astronomoj klasifikas la stelojn laŭ iliaj koloroj (aŭ pli precize, spektra tipo), en sep grupoj nomataj per literoj, de la plej varmaj blankaj steloj, ĝis la ruĝaj malpli varmaj." = English: heat and hot

<http://ttt.esperanto.org/AEK/biblio/modernas-tro.htm>

"Avineto!' ekkriis la infano, 'ho, prenu min kun vi! Mi scias, ke vi malaperos tuj, kiam la alumeto finiĝos, vi malaperos, kiel la varma forno, la bongusta ansera rostaĵo kaj la granda briletanta Kristnaska arbo!" ["Knabineto kun alumetoj" en *Fabeloj de Andersen* Tradukitaj de L. L. Zamenhof] = English: "hot stove/oven" (The original Danish has varm)

I then compared how certain passages had been translated in Esperan-

to, English, French and German.

Exodus 16:21: Kaj kiam la suno fariĝis pli varma, tio fandiĝadis. = And when the sun grew hot, it dissolved (Jerusalem Bible). Et quand venait la chaleur du soleil, cela fondait. (*Chaleur* is the noun, *chaud* the adjective in French) = Wenn aber die Sonne heiß schein, zerschmolz es.

Revelation 3:15: Mi scias viajn farojn, ke vi estas nek malvarma, nek varmega: mi volus, ke vi estu aŭ malvarma aŭ varmega. Tial, ĉar vi estas varmeta, kaj nek malvarma nek varmega, mi elsputos vin el mia buŝo. [I don't know just how hot the Koiné Greek ζεστος is¹.] I know thy works, that thou art neither cold nor hot: I would thou wert cold or hot. So then because thou art lukewarm, and neither cold nor hot, I will spue thee out of my mouth. (KJV). Je connais tes oeuvres. Je sais que tu n'es ni froid ni bouillant. Puisses-tu être froid ou bouillant! Ainsi, parce que tu es tiède, et que tu n'es ni froid ni bouillant, je te vomirai de ma bouche. (Bouillant = boiling). Ich weiß deine Werte, dass du weder kalt noch warm bist. Ach, dass du kalt oder warm wärest! Weil du aber lau bist und weder kalt noch warm, werde ich dich ausspien aus meinem Munde.

It could be argued that Waringhien's shameless tendency to gallocate Esperanto is in evidence in *Nova PIV*'s very French definitions. However, my conclusion is that both warm

1. A relatively uncommon word in ancient Greek, but used in this phrase in the New Testament. Liddel and Scott's *A Greek-English Lexicon* (9th edition, Oxford University Press, 1940) takes it as meaning "boiled" in "boiled meat", or, more generally, "hot" as in "hot springs," "hot water". — [E]

and hot are *varma* in Esperanto, and that *varmega*, as with other *-ega* forms, should be confined to extreme heat.

Note by the Ed.: The Encyclopaedia Britannica (CD ROM 2003) defines "warm" rather more ambiguously: "1 a: having or giving out heat to a moderate or adequate degree b: serving to maintain or preserve heat esp. to a satisfactory degree c: feeling or causing sensations of heat brought about by strenuous exertion." If I have "strenuously exerted myself" physically, in my way of speaking I feel decidedly "hot", not "warm". In Esperanto, I would not care to eat "varmeta" food, which to me would be "tepid", nor would I want it "varmega" which would burn my mouth. So the meaning does seem highly subjective. □

Revuo Esperanto: Ankaŭ en elektronika versio!

Komence de la nova jaro ĉiu membro-abonanto de UEA rajtas mendi aldone al la papera revuo ankaŭ ĝian elektronikan version — kiu povas esti en la formatoj PDF, simpla teksto, aŭ HTML. La elektronika versio estos liverata tuj post la finredakto de ĉiu numero kaj tiel atingados la membrojn je unu-du semajnoj pli frue. Por mendi la elektronikan version oni skribu al

reto@uea.org

indikante sian UEA-kodon. □



**POR RIDIGI
VIN**



En cirko:

"Kiel povas esti, ke tiel malforta kaj maldika viro estas tre bona dresisto de tigroj?"

"Ĉar kiam la tigro rigardas al li, ĝia apetito malaperas." [El *Eventoj*]

Aŭkciisto:

"Estas vendite!.. Al sinjorino en tria vico maldekstre, kies buŝo estas fermita per la mano de ŝia edzo." [El *Eventoj*]

La ses diversnivelaĵoj ekzamenoj en Aŭstralio

de Marcel Leereveld
Ĉefekzamenisto por AEA

Antaŭ dek jaroj ekzistis tri niveloj de ekzamenoj, kiuj juĝatis/-as en la sama maniero kiel en la lernejoj. La filozofio de tiuj ekzamenoj (*Elementa*, *Supera*, kaj *Klereca*) estas, serĉi kiom da eraroj la kandidato faras. Alivorte, la kandidato ne rajtas fari erarojn, kaj se ŝi/li faras erarojn, tiuj devas esti tre malmultaj. Se vi rigardas ekzemple la *Elementan Ekzamenon*, vi trovos, ke ĉiu Demando (ekz. "A passage of translation") portas nur 15 aŭ 10 aŭ eĉ 5 poentojn. Tio signifas, ke se vi faras nur resp. 8 aŭ 6 aŭ 3 erarojn, vi malsukcesas en tiu Demando, kaj estas facile malsukcesi en la tuta ekzameno, ĉar ĉiu persono faras kelkajn erarojn. Do la kandidato devas esti tre certa pri si kaj devas perfekte scii la gramatikajn regulojn. La vortoj mem ne estas granda problemo, ĉar la kandidato rajtas trovi la tradukon en la vortaroj. Sed eĉ tio kaŭzas kelkajn erarojn, ekz. se unu angla vorto havas tri aŭ kvar malsamajn signifojn, kio ofte okazas. Sed estas en la aplikado de la gramatikaj reguloj, kie okazas multaj eraroj. En tiaj ekzamenoj 65% estas bona rezulto.

Mi ne tre ŝatas tian sistemon, kie la juĝisto ja ne serĉas la bonan flankon de la kandidato, ne serĉas kaj kalkulas la bonajn vortojn, sed koncentriĝas serĉi nur la erarojn de la kandidato. Kaj kiu ne faras erarojn, eĉ en sia propra lingvo? Do mi enkondukis antaŭ kelkaj jaroj kromajn tri ekzamenojn: la *Bazan*, la *Mezan*, kaj la *Altan*. Alia tialo por enkonduki ĉi tiujn ekza-

menojn estis, ke pluraj membroj de AEA deziris pli facilan antaŭ la *Elementa*, kaj interajn ŝtupojn inter la *Elementa* kaj la *Supera*, kaj inter la *Supera* kaj la *Klereca*.

La filozofio malantaŭ tiuj tri ekzamenoj ne estas serĉi la erarojn kaj malatenti la bonan parton, sed serĉi la bonan parton kaj malatenti la erarojn. La tialo de tiu mia rezonado estas, ke ne multe gravas se persono faras erarojn de tempo al tempo, kiel ni ĉiuj faras, eĉ en la angla lingvo, sed ke gravas kiom da bona Esperanto ŝi/li kapablas uzi. Praktike tio signifas, ke la kandidato devas parkere scii 400 vortojn (1000 por la *Meza*), ne pli kaj ne malpli, kaj devas scii nur la *bazajn* regulojn de la gramatiko (pli por la *Meza*). Do se la kandidato scias nur 395 vortojn, ŝi/li ricevas nur 395 poentojn el 400 necesaj. Se la kandidato ne povas apliki (aŭ ne konas) unu gramatikan regulon, ŝi/li ricevas eble nur 95 el 100, eĉ se ŝi/li faras tiun eraron dekfoje. Se ekzemple la kandidato ne scias la vorton "patro", ŝi/li ricevas nur 399 el 400 poentoj (por la 400 vortoj), eĉ se tiu vorto "patro" aperas ok fojojn en la ekzameno, kaj ŝi/li ricevas 399 poentojn por la 399 aliaj vortoj de la Vortlisto.

Konsekvence, kaj ĉar la kandidato scias ke ŝi/li devas lerninti la 400 vortojn de la Vortlisto, kaj certajn bazajn regulojn gramatikajn, la juĝisto atendas, ke la kandidato scias kaj uzas ĉiujn 400 vortojn ĝuste en la ekzameno, kaj ĉiujn bazajn regulojn, kaj do

akiros por tio 100% por sukcesi. Sed ĉar ni scias, ke kelkaj personoj estas iom nervozaj dum ekzameno, ni akceptas kiel normale, ke kandidato faras pro tio kelkajn erarojn, kaj ni do deklaras, ke ŝi/li tamen sukcesis per 95%. Sed ni ankaŭ scias, ke homoj (speciale ne plu junaj) ofte forgesas vorton ĝuste tiam, kiam ili bezonas ĝin, kaj ni deklaras ke ŝi/li sukcesas eĉ per 90%. Sed ni ankaŭ scias, ke kelkfoje kandidato iom malsanas (malvarmumo, ktp.), kaj pro tio faras gramatikan eraron, kaj tial ni deklaras, ke ŝi/li jam sukcesas per 85%. Kaj fine ni scias, ke Esperanto-lernantoj ofte multe laboras por vivteni sin, kaj do estas tre lacaj dum ekzameno, kaj do ne povas klare pensi, kaj faras erarojn pro neatento, kaj tial ni eĉ deklaras ŝin/lin sukcesa per 80%. Sed sube de tiu procentaĵo nia komplezo kaj nia indulgo finiĝas. Ni ne diras, ke tiam ŝi/li malsukcesis, ni simple diras ke en tia kazo (malpli ol 80%) la kandidato ne scias sufiĉe (ŝi/li teorie devas scii 100% = ĉiujn 400 vortojn en la Listo) por prepari sin por pli "alta" ekzameno (*Elementa* aŭ *Meza*) post la *Baza*. Ĉiu kandidato scias, kiujn 400 vortojn kaj kiun gramatikon ŝi/li devas komplete lerninti.

Akiri 80% do ne estas malfacila, ĉar la kandidato rajtas "forgesi" du el ĉiuj dek vortoj (kio estas vere tro indulga), kaj eĉ se tiuj du vortoj aperas ok aŭ dek ok fojojn malĝuste en la ekzamenrespondaro. Ĉar ni ja ne serĉas la erarojn ĉe la homoj, sed ni nur adicias ĉiujn vortojn ĝustajn.

Pro tiu nia indulgo la kandidato povas (sciante la 400 vortojn) fari plurajn erarojn en la Demando pri la Gramatikaj Reguloj (Demando 3 en la *Baza*); pro neĝusta instruado kaj pro

nebonaj lernolibroj plej multaj kandidatoj scias tro malmulte por tiu Question 3 (Question 1 en la *Meza*), sed ili tamen akiras ĝenerale pli ol 79%.

Nu, vi rajtas ne ŝati ĉi tiun ekzamen-filozofion, kaj preferi la malmalmodernajn ekzamenojn (*Elementan* kaj *Superan* kaj *Klereco*). Sed la novaj indikas ekzakte, kiom da esperantaj vortoj iu persono scias kaj povas uzi, kaj tamen rajtas fari erarojn, kiel ĉiu homo faras. En la malmalmodernaj ekzamenoj oni ne rajtas fari erarojn, aŭ nur tre tre malmultajn.

Mi esperas, ke vi komprenas la novan sistemon. Fakte en la novaj ekzamenoj oni povas pli facile "sukcesi" per 80% ol en la malnovaj per 60%, ĉar oni scias antaŭe, kiuj vortoj povos troviĝi en la Demandaro (400 vortoj) kaj kiujn gramatikajn regulojn oni devas apliki (ili menciatis en la *Guide for First Examinations* kaj en la *Study Book for the Baza and the Elementa*). □

Ekzamenrezultoj

Sukcesis en la Baza Ekzameno:

Gloria Bristow (S.A.)
Daniel Forrest (W.A.)
Peter Maquire (W.A.)
Trish O'Connor (W.A.)
Nancy Roy (S.A.)

Sukcesis en la Supera, kun Honoro:

Terry Manley (N.S.W.)

Ni gratulas ĉiujn sukcesintojn.

[Informis Marcel Leereveld,
ĉefo de la Ekzamenkomisiono de AEA]

Malapero de *Eventoj*

La eldonisto de la du-semajna ĵurnalo *Eventoj* anoncis ke *Eventoj* ĉesas aperi ekde la fino de la pasinta jaro, 2002. □



Skribas la Legantoj



Skribas Brendan Linnane:

Mi legis la artikolon en *ESK* pri “Sportheroo”.

Supozeble la redaktoro ne scias multe pri sportoj en Australio.

“Futbalo” estas la angla “soccer”, laŭ la kompreno de la plimultego de esperantistoj.

Certe Riĉjo Reynolds ludis la veran piedpilkon aŭstralian, kaj certe Essendon ne estas Soccer-klubo!

Laŭ *NPIV* — tipa fuŝaĵo:

Sub “pilko”, piedpiko = futbalo, kaj sub “futbalo” troviĝas “sporto en kiu dekunuhomaj teamoj penas enĵeti rondan pilkon en kontraŭan golejon, sen uzi la manojn”.

La difino *NPIV*a de “rugbeo” uzas nek “piedpilko” nek “futbalo”.

Mi ankoraŭ ne trovis ion pri la irlanda, kanada aŭ usona sportoj kiuj sin nomas “football”.

Brendan pravas, ke mi neniam scias pri aŭstraliaj sportoj, kaj ilia terminaro. Rilata al NPIV, grava problemo, kompreneble, estas ke la sport-redaktado en NPIV estas eŭropocentra. Ne mirinde, ĉar almenaŭ du el la sportredaktintoj por NPIV estas francoj, kaj eble ĉiuj tri. Sed kiel nomi la ne-“soccer”-ajn specojn de football estas granda problemo. —

Skribas Franciska Toubale:

Respondo al la alvoko de Marcel

La alvoko de Marcel en la sesdeka numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* surprizis min: kvankam mi renkontas Marcelon de tempo al tempo, laŭ mia memoro, li neniam aludis al sia malkontento pri la intervjuoj elsenditaj de radio 3ZZZ. (Kvankam la nomo ne estas menciita, mi supozas ke

temas pri ĝi, ĉar mi ne konas alian Esperanto-radion en Aŭstralio).

Kritikoj estas bonvenaj. Ili helpas la kritikiton al pliboniĝo, kondiĉe ke ne temas pri esprimado de pure negativa juĝo. Kial la intervjuoj ne devus esti elsenditaj? Ĉu ili estas teknike ne bonaj, ne aŭdeblaj? Ĉu la temoj ne estas allogaj? Ĉu la “fuŝetiĝo” estas lingva, t.e gramatikaj aŭ vortprovizaj eraroj?

Tamen la plejparto de la intervjuoj devenas de Radio Polonio aŭ Viena-programoj, ambaŭ elsendataj de profesiuloj. Nur okaze de grava evento en la loka movado, kiel la kreado de nova grupo de entuziasmaj junuloj, la ĉiujara somerkursaro, aŭ eksterlandaj kongresoj, Svetoslav Kanaĉki kaj mi elsendas niajn proprajn intervjuojn.

Ambaŭ el ni kaj kelkaj aliaj membroj de la 3ZZZ-teamo ja lernis per kurso de la radiostacio bazajn principojn pri la “arto” intervjui. Kiel spertiĝi nun, se ne per praktikado? Ankaŭ la reagoj de la aŭskultantoj povas esti gvidilo.

Ĉiukaze, nia ambicio ne estas kompari nin al profesiuloj. Ni ne estas dungitaj de registara amaskomunikilo. Nia radio estas multkultura komunuma radio, rimedo por ke ĉies voĉo trovu lokon por sin esprimi en sia preferata lingvo. La celo ne estas propagandi Esperanton, sed doni la oportunon aŭskulti programon en Esperanto, unue al la kvardek membroj kiuj pagas por ke la programo ekzistu. La celo ne estas sekvi la sintenon de socio kiu alte taksas nur la opinionon de

titoluloj kaj silentigas la ceteron. Ĝuste nun, je la rando de milito, la esprimo de la pasiva “silenta plimulto” (laŭ franca parolmaniero) akre bezonatas. Ni komencu paroligi ilin per simplaj, neperfektaj intervjuoj. Mi povas eĉ imagi ke tiu ne-pretendo povas allogi hazardan aŭskultanton ne esperantistan.

Konklude, mi diru ke tiom da homoj, tiom da gustoj. Spite la vidpunkton de Marcel, kelkaj el niaj intervjuoj trovis sian lokon en la programo kaj eĉ en la arkivoj de Radio Polonio, kaj kaŭzis reagojn de aŭskultantoj de la alia hemisfero.

Skribas Leila Lucas:

4.11.02

It is with sad regret that I wish to inform you that my Dad, Clarence Dunstan, passed away recently.

I know Dad enjoyed receiving his Esperanto magazine. In fact I believe his interest in Esperanto began at an early age with a teacher while he was still at primary school.

He was dearly loved by his family, a man of quiet strength and humility with a humourous wit and a strong love of literature.

I've sent one of Dad's poems to you which I was privileged to read at his funeral, and thought you may like to publish it in your magazine.

Drifting down a mortal seaway

To a stage beyond recall, —
Evening shadows of a lifeway
Reflecting much, reflecting all.

Shades of times in far flung places,
Shades of times by homely door;

In the shadows drifting faces,
Faces that have gone before.

Though perhaps there's more to suffer,

As the lengthening shadows grow,
May the seaways wild and rougher
And the freeboards getting low.

Bale not with a rusting filler
As eternal waters close,
Just rest your hand upon the tiller
— Hold it steady as it goes.

Brighter faces now unfolding,
These are cherished most of all,
Firmly in the shadows holding,
Family portraits standing tall.

Births and weddings all pervading
And the chapters in between.
Now at last they too are fading,
Fading slowly from the scene.

What lies beyond the final staging
There is only One who knows —
Though the tiller may be aging,
Hold it steady as it goes.

Clarence Schofield Dunstan



POR RIDIGI VIN



Sur turista vojo ĉe montfendejo deĵoras tre fortika ĉiĉerono kaj kontraŭ unu rublo helpas al turistoj transiri laŭ mallarĝa ponteto.

La plej malkuraĝajn li prenas subbraken kaj transportas. Jen aliras granda grupo kaj enviciĝas. La fortikulo translokas ĉiujn, du lastajn li prenas subbraken kaj iras. Meze de la ponteto lia nazo jukis. Li gratis ĝin kaj faligis unu turiston. La ĉiĉerono rigardas la turiston falantan malsupren kaj diras: “Ha, diablo prenu! Restu kun via rublo!

[El *Evento*]

Indekso 2002

55 = *ĜK* januaro-februaro 2002

56 = *ĜK* marto-aprilo 2002

57 = *ĜK* majo-junio 2002

58 = *ĜK* julio-aŭgusto 2002

59 = *ĜK* septembro-oktobro 2002

60 = *ĜK* novembro-decembro 2002

Ekzemplo: 58/21 = *ĜK* julio-aŭgusto 2002 paĝo 21

(DB) = Donald Broadribb (redaktoro de *ĜK*)

ML = Marcel Leereveld (ĉefo de la ekzamenkomisiono)

AEA:

19a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto 2003 58/21

AEA, ni rigardu antaŭen (Jennifer Bishop) 60/8

Auditor's Report 57/28

La ĉefa jarkunveno de AEA la 10an de januaro 2002 en Perto (John Gallagher) 56/25

El la sekretario: Nova adresaro, Provizora tagordo de la Ordinara Ĝenerala Jarkunveno 2003 59/13

La libroservo de AEA 55/20

Pri la somerkursaro en Perto (Franciska Toubale, Jennifer Bishop, Komitato de Somerkursaro 2002) 56/3

Raporto de la korespondkursa servo de AEA de decembro 2000 ĝis decembro 2001 (Hazel Green) 56/27

Dezirata korespondi 55/11, 56/10

Diversaĵoj:

La 1-a monda civila socia forumo (Bessie Schadee) 59/19

Alvoko [intervjuadi] (M.L.) 60/12

Duobligado, Jacques Chirac, "Astronomio: amatoroj kontribuas", OpenOffice.Org 58/29

La Esperanto-movado: kiel allogi la junulojn? (Daphne Lawless) 59/11

"Grupo Esperanto 24" 56/29

Kuriozaĵo el Rio (Alóisio Sartorato) 57/25

Malrapida merkato 57/6

Oceania komisiono (Kep Enderby) 56/9

Poŝ-atlaso, Mikrogravuraĵo kun portreto de Zamenhof, Naturista Vivo, 3a Azia Kongreso de Esperanto 56/28

Poŝtkartoj de John Bailes (Ralph Harry) 56/20

Promeno al bieneto (José Roberto Tenório) 60/6

Renkontiĝo de esperantistaj familioj (Bart Demeyere) 60/25

Ret-eldono de *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary* (Donald Rogers) 58/14

Sportheroo: Riĉjo Reynolds (Stephen Pitney) 60/7

Ekzamenoj:

Baza and Meza Examinations (M.L.) 57/14

Sukcesintoj 56/13

El la regionoj: 55/25, 56/29, 57/26, 58/23, 59/28, 60/26

For the Beginner:

Active Voice and Passive Voice (M.L.) 57/14 (Komentoj de D.Rogers 58/22; respondas M.L. 59/21), 60/13

Auxiliary Verbs (M.L.) 58/17

Baza and Meza Examinations (M.L.) 57/14

"Elŝuti", Unicode, Simredo (DB) 57/13

Esperanto Style (DB) 58/16

"Falsaj amikoj/False Friends" (DB) 59/15

Kiss — "Keep it Simple, Stupid" (DB) 60/20

"Krozilo" (DB) 59/14

"Mastruma sistemo", "kongrua", Unix (DB) 58/16

Pronunciation (DB) 55 Eng *Supp.* p.1

Tiparo (DB) 60/19

Transitive and Intransitive (M.L.) 56/18 (kaj vidu ankaŭ ĉisupre "Active Voice and Passive Voice")

What is an "Official" Word? (DB) 59/14

What on Earth Does "Transitive" Mean? (DB) 56/14

Instruado:

Pri la instruado de Esperanto al infanoj (Ron Gates) 58/6

Komputiloj kaj Interreto: 55/20, 56/23, 57/8,23, 58/25, 59/26, 60/8

Konkursoj:

Faru vortojn el 9 literoj donitaj 57/7 58/13, 59/26

Vortoj bazitaj sur la radiko "skrib" 59/18

Vortoj formeblaj el la literoj en la vorto esperanto (rezultoj) 55/21, 56/29

Lingvodiskutado:

Esperanto — lingvo por ĉiuj — lingvo por ni (Jukka Laaksonen) 56/22

La evoluo de Esperanto (M.L.) 57/20

Kio estas pronomo? (M. L.) 55/21

Lingvaj konsiloj de Zamenhof: diversloke en 56/4-22, 57/12-22

Neologismoj (Kalocsay kaj Waringhien) 59/20

Propraj nomoj en Esperanto (M.L.) 60/11

Serioza enketo 59/18

(Ankaŭ plurparta diskuto pri la transitiveco de verboj, parte en la angla, parte en Esperanto: vidu ĉe "For the Beginner")

Literaturaĵoj:

"Humpti Dumpti" (el *Trans la Spegulo*) de Lewis Carroll 55/1

"Perloj en mia tago" (poemo) (June Armstrong) 55/20

"Por kiu ne forgesas" kaj "Ĉar estas vi la poezio" poemoj (María de los Ángeles Caraballo Mauriz) 59/5

NZZEA:

Kongreso 2002 en Wellington (Rogers & Gravatt) 57/17

NZZEA Kongreso en 2003 58/13

Novzelanda UEA-peranto 59/5

Odlo Bokserp: 55/26, 56/30, 58/30, 59/30, 60/28

Personoj:

Honoro al **William Auld** 55/9

Intervjuo kun **Margaret Chaldecott** (Terry Manley) 58/3

Nekrologo: **Brian Currie** 60/27

Miraklon post miraklo en Edzperantujo (**Paul Desailly**) 60/4

Nova "klerulo": **Ron Gates** 58/22

Intervjuo kun **Eunice Graham** (Terry Manley) 59/9

Nekrologo: **Sydney Grant** 56/10

Nekrologo: **Ralph Harry** 60/27

Postkongresa vojaĝo tra Nov-Zelando

(**Tereza Kapista**) 60/22

Spertoj en Japanio (**Dianne Lukes**) 58/27

Nekrologo: **John Moore** 58/24

Nekrologo: **W. Dudley Parkinson** 55/10, 59/24

Mia vojaĝo al Perto (**Franciska Toubale**) 57/3

Survoje al Kanbero (**Franciska Toubale**) 58/21

Nekrologo: **Ruth Tumman** 59/24, 60/10

Nekrologo: **Fred Turvey** 57/7

Recenzoj:

Dante Alighieri: *Purgatorio* (ĉ) 56/13

Aniruddha Banhatti: *Aniruddha rakontas* (ĉ) 55/15

Lewis Carroll: *Trans la spegulo kaj kion Alico trovis tie* (Graham Macoidh) 55/16

Michel Duc Goninaz (red.): *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (ĉ) 60/3

Nikolaj Gogol: *Malvivaj animoj* (ĉ) 56/5

Harry Harrison: *La kaptita universo* (ĉ) 55/13

Ralph Harry: *Vortoj kun flugiloj*, 2a eldono (ĉ) 59/8

Internaciaj lingvoj kaj internaciaj homaj rajtoj (ĉ) 58/29

Boris Kolker: *Vojaĝo en Esperantlando* (Debra McCarney) 59/6

Marko Polo: *La libro de la mirindajoj* (ĉ) 55/12

Cezaro Rossetti: *Kredu min, sinjorino* (Arturo Mortimer) 59/3

Tivadar Soros: *Maskerado ĉirkaŭ la morto* (ĉ) 55/13

Trevor Steele: *Falantaj muroj* 57/5

Trevor Steele: *La fotoalbumo vol.1* (ĉ) 56/12

Vladimir Varankin: *Metropoliteno* (Ron Gates) 57/9

www.cursodeesperanto.com.br (Vera Payne) 59/6

Skribas la legantoj:

Donald Rogers 58/22, 60/13

István Ertl 57/6

Marcel Leereveld 59/21

**LA AŬSTRALIA KAJ LA
NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ**

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: *Jennifer Bishop*, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH); 📠 03 9905 3668 (BH).

esperanto@education.monash.edu.au

Vicprezidantoj:

Franciska Toubale, 1 Marne Rd, Mt Evelyn Vic 3796.

franciska@bigpond.com

Hazel Green, 44 Toowoomba Rd, Oakey Qld 4401.

hazgreen@twmba.net

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268.

abcetc@ozemail.com

Vicsekretario: *Bob Felby*, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.

esperantobob@iprimus.com.au

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Pitney@Cybernetint.net

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: *Bradley McDonald*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

☎ 09 579 4767, 📠 09 579 6087.

bradley@esperanto-lingvo.org

Sekretario: *Howard Gravatt*, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035. ☎ 09 626 6129.

hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: *Jackie Fox*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09-826 2081.

brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2003 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 2003 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ENK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac. La programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata per iMac, uzante Acrobat-on.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmistoj

Vera Doloro, L.M.K.

[lia multsuferanta kontrolanto]

Pro tio ĝrav malvolis, Odlo Bokserp ne povis prilabori ĉi tiun numeron de ENK. Ni petas vian indulgon.